

Bulgara Esperantisto

Oktobero 1989



- 5 Antaŭ 42-Kongreso (prof. Kiril Popov, Radoslav Paraŝkevov, Ĥristo Manolov, Ĥristo Tonev)
- 8 Kongresa somero (Evgeni Georgiev, Dimitâr Dimitrov, Georgi Litov)
- 14 Juna Esperantisto (Mariana Petrova)
- 15 Nacia E-grupo de prelegistoj
- 19 Unua plenero en Gabrovo (Radi Banĉevski)
- 20 Somera gastado en Mezaj Rodopoj (M. Todorova, Atanas Ilkov)
- 24 La fenomeno Vanga (Krasimira Stojanova)
- 26 Dum ISEU, oni ne enuas (Mariana Evlogieva)

Cefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimitâr HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VÂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuajlojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkita nur en Esperanto, tajpita aŭ klare skribita. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 47 landoj.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

PERANTOJ DE „BE“

Britio

s-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Grimsby, South Humberside DN 365 RT

Francio

Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
S-ro Joseph Barré, 10, Rue du Sénat, F — 44300 Nantes

Japanio

S-ro Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1—2418—18 Tokorozawa 359

Meksikio

S-rino Leonora Torrez T., Playa Hornos 575, Col. Marte, 08830 México D. F.

S-ro Enrique Lemus, Insurgentes Sur 3493, Villa Olimpica, Edif. 27—001, 14020 México, D. F.

Sud-Afriko

S-ro C. S. Beckford, P. O. Box 1227, Cape Town, 8000 Sud-Afriko

Svislando

Esperanto-Perantejo Bern, Weingartstr. 21, CH—3014 Bern

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „BE“ eksterlande povus turni sin al la Redakcio. La rabato por la perantoj estas 25% de la kolektita abonsumo kaj ili ricevados la revuon senpage.

Sur la unua kovrilpaĝo: Panoramo de someraj E-arangoj: supre — Plenero en Gabrovo (foto Donĉo Ĥitrov), E-karnavalo en Tuluzo (Francio); meze — la aktorino Anna Ivkova kaj Mark Fettes — redaktoro de „Esperanto“, dum ISEU'89 (fotoj Veneta Baleva), rok-grupo „TEAM“ koncertis dum 74-a UK; malsupre — 70 jarojn E-movado en Orjahovo (Bulgario), partoprenantoj en ISEU'89 (foto Ĥristo Metev).

Lige kun la 42-a Kongreso de BEA, kiu okazos en somero de 1990, la Redakcio lanĉas rubrikon „Antaŭ 42-a Kongreso de BEA“.

Ni invitas ĉiujn bulgarajn esperantistojn partopreni ĝin per konkretaj proponoj rilate la statuton de BEA, ĝia agado, strukturo ktp.

„BE“

Pri perfektigo de la agado

Tiu baza ideo penetris profunde en la dokumentojn de la Plenkunsido de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), kiu okazis la 11.02.1989. En la akceptita programo estas konkretaj taskoj por ĉiu asocia laborgrupo. La plenumo de tiuj taskoj kontribuas por la plua proceso de renovigo de BEA.

Unu el la bazaj funkcioj de la Komisiono pri la Organiza Agado kaj helporgano de BEA estas akordigi la agadon kaj certigi la normalan funkciadon de asociaj ĉeneroj. Tial tuj post la plenkunsido la Komisiono organizis kelkajn metodikajn seminariojn por aktivuloj de esperantistaj societoj el la tuta lando.

Dum sia 82-jara ekzisto Bulgara Esperantista Asocio edukis multe da esperantistoj kaj agantoj, ĝi havas siajn tradiciojn en la disvastigo, lernado kaj popularigo de internacia lingvo Esperanto.



(Daŭrigo sur paĝo 5)

Jaro 58

N-ro 10

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

NIA E-MOVADO JAM CENTJARIĜIS

Nikola ALEKSIEV

Ĉi-aŭtune ankaŭ la bulgara E-movado jubileas: komplete pleniĝis tuta jarcento de post ĝia naskiĝo!

Kompreneble ĝi ligis sian naskiĝon kaj evoluadon kun la procedoj en la internacia E-movado.

En la antaŭvespero de tiu grava jubileo ni faru provon skizi koncize la historian vojon de la bulgara esperantistaro kaj fari almenaŭ kelklinian prognozon kaj perspektivon de ties estonta agado.

La naskiĝo de nia movado okazis preskaŭ tuj post la apero de Esperanto en 1887. Jam en la sekva jaro progresemaj bulgaraj intelektuloj ekinteresiĝis pri ĝi. La unua inter ili, la d-ro de juro Miloslav Bogdanov estis la plej insistema. Li iniciatis gazeton „Mondlingvisto“, eldonis lernolibron de Esperanto por bulgaroj, organizis kursojn. Fine ekfunkciis en Sofio la dua en la mondo (post Nurnbergo) E-klubo (1889).

Sed la objektivaj cirkonstancoj de la juna burĝa ŝtato ne estis tre favoraj por E-agado. Plej ofte regadis reakciaj reĝimoj. Ili iniciatis du balkanajn militojn (1912—1913), poste reĝo Ferdinando trudis la aliĝon de Bulgario en la komenciĝinta en 1914 Unua Mondmilito. Ĉiuj tri militoj starigis la landon antaŭ abismo.

Nur la registaro de Agrarana asocio dum la unuaj postmilitaj jaroj regis demokrate. Ĝi enkondukis Esperan-

ton kiel fakultativan lernobejkon en la programo de mezlernejoj.

Tamen dumnokta faŝisma militista puĉo renversis en 1923 la demokratian registaron. Post nelonge — en 1928, estis nuligita la fakultativa instruado de Esperanto, dissolvita la Gelernanta E-Asocio kaj malpermesita ties organo — „Esperantista Gejunularo“, kaj la vizitado fare de lernantoj de E-kursoj por civitanoj.

Sub tiuj malfacilaj kondiĉoj de polica persekutado kreiĝis la Laborista E-Asocio. Tamen ĝi estis sub ĉiama polica premado, ĝis kiam en 1934 ĝi estis dissolvita. La ĝenerala faŝisma premo sufokigis ankaŭ la neŭtralan E-movadon: ne plu okazis post 1942 kongresoj, ĉesis aperi la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ ktp.

Nur post la popola venko super la faŝisma diktaturo en septembro de 1944 ebligis la renaskiĝon de libera kaj unueca Bulgara E-Asocio. Tiu disfloro daŭris bedaŭrinde nur ĝis 1949. Preskaŭ dum kvin jaroj (1949—1954) la Asocio estis sufokita far la stalinisma kulto de Ĉervenkovo. Ekzistis nur la Bulgara E-Kooperativo. Plej poste en 1954 la esperantistaro ricevis permeson rekrei sian memstaran E-asocion.

Komenciĝis energia agado por stabiliĝo de la movado kaj disvastigo de Esperanto. Kreskis la asocia membraro, aperis lernolibroj, malfermiĝis

kursoj, aperadis pluraj E-gazetoj kaj revuoj, same originalaj kaj tradukaj libroj. BEA regule kunvokis siajn kongresojn. Leviĝis la nivelo de la tuta movado kaj tio kreis favoran al ĝi socian atmosferon inter la neesperantista publiko.

Establiĝis solidaj ligoj kun UEA kaj diversaj fakaj E-organizaĵoj. Estis organizitaj ege sukcesaj du Universalaj E-kongresoj (en Sofio, 1963 kaj en Varna, 1978), samtempe du kongresoj de TEJO, du kongresoj de IFEF (Varna, 1968 kaj Slânčev brjag, 1978), tri Ĝeneralaj konferencoj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) (Sofio, 1963; Ruse, 1976; Varna, 1978). Organoj de kelkaj internaciaj fakaj organizaĵoj aperadis en Bulgario: ekz. „Internacia Ĵurnalisto“ en daŭro de pli ol kvaronjarcento, „Paco“ kaj „Pacaktivulo“ — en daŭro de 15, respektive de 25 jaroj k. a. Kreiĝis altnivela Bulgara Esperanto-Teatro, kiu regule partoprenis la kulturen programon de la universalaj kongresoj. Estis konstruita impona Internacia E-kursejo en Rodopi-montaro apud Smoljan (Pisaniĉa). BEA tre aktive partoprenis la internaciajn E-eventojn (UK, konsultiĝoj, simpozioj k. s.). Tiu aktiveco de nia landa movado levis la aŭtoritaton de bulgara esperantistaro kaj ĝia asocio en la okuloj de la internacia movado. Kaj ne hazarde UEA distingis dum la jubilea kongreso de Esperanto en Varsovio Bulgaran E-asocion per la pokalo „Fyne“ pro ĝia riĉa programo dediĉita al la Centjariĝo de Esperanto.

Jen skize prezentita la bildo de nialanda E-movado dum la jubilea periodo (1889—1989). Kaj plue? Jen la aktuala demando!

Gravegaj eventoj komenciĝis antaŭ nelonge post la deklarita perestrojko en Sovetunio kaj en la ceteraj socialismaj ŝtatoj (Ĉinio, Jugoslavio, la landaro de Varsovia pakto). Sed tiu procezo naskis perestrojkajn fenome-

nojn ankaŭ en la cetera mondo. Antaŭ ĉiuj ŝtatoj, antaŭ ĉiuj ideoj, profesiaj, kulturaj ktp movadoj kaj organizaĵoj ekstaras novaj taskoj, solveblaj per nova nekutima pensmaniero. Tio rilatas ankaŭ al la esperantistaro nialanda kaj internacia. Ni ja funkcias en la kadro de tiu mondo kaj ni ne povas ne influigi de la novaj realaĵoj en ĉiuj sferoj de la vivo.


Ni devas serĉi konstante punktojn kaj taskojn de solidareca agado en la intereso de la landa kaj internacia E-movado. Ne konstanta disputo pri problemoj kiuj disigas nin, sed intensa strebo al komuna agado en la nomo de reciproke akcepteblaj taskoj kaj celoj. Ni estas vive interesataj pri savo de la vivo surtere, pri evitigo de nuklea pereco de l'Homaro, pri paca solvo de disputproblemoj lige kun interŝtataj konfliktoj, pri solvo de tiom gravegaj ekologiaj problemoj, pri aktiva internacia kooperado en la ekonomia, socia kaj kultura sferoj, pri unuecigo de la fortoj de diverslandaj scienculoj kaj specialistoj kontraŭ la malsanoj, malsato, analfabeteco ktp.

Jen la vojo, kiun ni devas sekvi kiel konsekvencaj pacemuloj, por kontribui laŭ niaj fortoj kaj specifaj eblecoj por krei kondiĉojn, sub kiuj malfermiĝos ankaŭ al Esperanto novaj pli favoraj horizontoj.

Tion ni povas atingi per ĉiufanka aktiviĝo de nialanda movado, ĉar nur bone organizita kaj pli amasa esperantistaro povas utiligi la novajn cirkonstancojn dum la alpaŝanta XXI jarcento por prepari la grundon pri rekono de Esperanto far la ŝtataj kaj interŝtataj oficialaj medioj kaj organizaĵoj. Nur forta movado en landa kaj internacia skalo povas utiligi la eventualan pli favoran situacion en la proksimaj tri-kvar jardekoj por akceptigi Esperanton al la bezonoj de nia ĉiam pli kaj pli unuiganta kaj internaciiganta mondo.

Kuraĝe kaj optimisme al la nova erao de nialanda movado!

El la fotoarkivo de Bulgara E-Muzeo



● La dua lernolibro de Esperanto por bulgarioj, 1895 (supre maldekstre).

● Delegitoj de la fondkongreso de Bulgara Esperantista Ligo (nun BEA, u. V. Târnovo, 5—6 aŭgusto 1907 (supre dekstre).

● Sofiaj esperantistoj gastigas zagrebanojn, 1911 (malsupre).



AL LA JUBILEO — PLENFORTE!

Ni estas en la antaŭvespero de grava evento en la vivo de nia E-organizo — la 100-jara jubileo de Esperanto-movado en Bulgario. Kiel sciante, la unua E-klubo en Bulgario estas fondita en oktobro 1889. Ĝi estas la kvara en la mondo — post la kluboj en Nurenbergo (Germanio), Moskvo kaj Odeso (Rusio). Entuziasma iniciatinto kaj organizinto de la unua bulgara E-klubo estas Miloslav Bogdanov, konsiderata kiel la unua bulgara esperantisto. Krome Bogdanov komencis eldoni E-gazeton „Mondlingvisto“ (decembro 1889) kaj preparis la unuan lernolibron de Esperanto por bulgaroj (1890).

BEA devas celebri inde la 100-jaran jubileon. La Buroo de CE akceptis planprogramon por tio. Per kelkaj vortoj mi konigos ĝin al la legantoj.

Estos eldonita (en bulgara kaj en Esperanto) broŝuro „100 jaroj de Esperanto-movado en Bulgario“ de Nikola Aleksiev. La bulgarlingva varianto estos dissendita al ĉiuj E-societoj helpe al la raportantoj en la solenaj kunvenoj en la tuta lando. Estos eldonita ankaŭ unika jubilea gazeto. Estas farita propono pri eldono de jubilea poŝtmarko. Ellaborita estos nova E-insigno. Al la Televideo kaj Radio Sofia estas adresita peto respeguli bone la jubilean celebron. Pere de la Televideo estos organizita E-kvizo kaj „Ronda tablo“ (dialogo) pri Esperanto kaj la E-movado en Bulgario.

La lastan semajnon de novembro BEA inaŭguros grandan ekspozicion de E-libroj kaj E-gazetaro en Bulgario — tio okazos en la Nacia Biblioteko „Kiril i Metodij“ — la plej renoma simila instituto en nia lando. Samtempe estos aranĝita aliloke en Sofio ekspozicio „La bulgara E-movado en fotoj“.

La 1-an de decembro Bulgara E-Teatro prezentos la spektaklon „Lanĉo“ de Emilia

Lapenna (momento el la vivo de Zamenhof). Tuj poste estos projekciita la filmo „100 jaroj de Esperanto“.

Kulmino de la jubilea celebros sendube estos la 2-a de decembro j. k. Antaŭ tagmeze okazos scienca sesio pri la bulgara E-movado, en kiu konataj bulgaraj esperantistoj D. Papazov, V. Oljanov, K. Vălev, prof. K. Popov, doc. Cv. Kardašev) traktos bazajn aspektojn kaj problemojn de nia movado bulgarlingve. Post ĉiu prelego sekvos diskutoj.

Vespere la 2-an de decembro okazos solena jubilea kunveno kun raporto de samideano N. Aleksiev kaj riĉa artprogramo de profesiuloj-esperantistoj.

Multaj E-societoj povus sendi bonajn aktivulojn al Sofio por partopreni la aranĝojn je la 1—2 de decembro. Apartaj esperantistoj povus veni ankaŭ proprakoste.

Estas rekomendinde ke ĉiu E-societo en la lando organizu solenan jubilean kunvenon en prestiĝa salono kun prijubilea raporto kaj artprogramo. Pri la kunveno oni faru bonan diskonigon, invitante la tutan urbanaron, la laborantan kaj lernantan junularon. La kunvenoj okazu en novembro kaj decembro.

Krom la solenaj kunvenoj la E-societoj, E-kluboj kaj E-kulturdomoj efektivigu ankaŭ aliajn iniciatojn pere de la lokaj radiostacioj, aperigon de materialoj en la loka ĵurnalo, aranĝon de murgazetoj kaj vitrinoj, fotoj el la societa vivo ktp.

La inda organizo de la jubilea celebros estos bona starto al inda renkonto de nia 42-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj estontjare.

Kunĉo VĂLEV

PRI PERFEKTIGO DE LA AGADO



En la movadon ĉiujare eniras novaj anoj, parto de kiuj aktive partoprenas la gvidadon de diversaj asociaj laborgrupoj. Tiuj homoj ankoraŭ ne posedas la konojn kaj spertojn, necesajn por pli efektiva propagando inter la loĝantaro, ŝtataj kaj sociaj organoj kaj organizaĵoj. Pro tio la okazintaj seminarioj en Gorna Orjaĥovica, Sofio kaj Stara Zagora estis tre utila formo por spertoŝanĝo inter la agantoj de esperantistaj societoj, la E-kulturdomoj, sekcioj kaj kluboj kaj la reprezentantoj de Centra Estraro de BEA. Konversaciojn pri diversaj problemoj (organizaj, instruaj, apliko de Esperanto, strukturo kaj taskoj de tutmonda E-movado) kiel ankaŭ pri senperaj praktikaj demandoj prezentis membroj de Buroo de CE de BEA (D. Papazov, K. Vălev, V. Oljanov, R. Paraŝkevov, D. Petrov, prof. K. Popov, Iv. Ĉulev).

Oni sciigis ankaŭ pri la fondiĝo ĉe CE de BEA de firmao „Esperanto-turisto” lige kun la internacia agado kaj enlandaj E-iniciatoj, kun internacia partopreno.

Estis pridiskutita detale la demando pri la financa stato de BEA kaj la financaj problemoj de unuopaj societoj konforme al iliaj planoj, raportoj kaj iniciatoj.

Speciale oni atentigis pri la organiza situacio de societoj, kiuj estiĝas memstaraj bazaj organizaĵoj unuoj kaj devas unuigi ĉiujn esperantistojn en la komunumo kaj subteni intimajn kontaktojn kun la komitatoj pri la spirita

disvolviĝo, partopreni en la komunaj kulturaj kaj aliaj iniciatoj en la komunumo. Al la komunuma societo devas aliĝi ankaŭ apartaj izolitaj esperantistoj el najbaraj loĝlokoj kie ne estas E-societoj.

En iuj regionoj (Sofio, Plovdiv, Stara Zagora, Razgrad, Pleven, Burgas kaj Veliko Târnovo) estas E-kulturdomoj, kiuj devas havi tre proksimajn organizaĵajn ligojn kun la societoj kaj organizi la kulturan esperantistan agadon.

Por disvolviĝo de profesioj kaj kontentigo de intereso ĉe esperantistoj estas bezonata apliko de Esperanto en la praktiko. Lige kun tio ĉe CE de BEA funkcias sekcioj, sed ĉe la societoj resp. E-kulturdomoj estas koncernaj kluboj pri profesioj kaj intereso. Do, la societaj estraroj devas koni ankaŭ la interesojn kaj la profesiajn tendencojn de siaj membroj, kontribui al la formiĝo de koncernaj kluboj kaj ilia regula organiza kaj profesia evoluo. Oni rekonas la ekziston de sekcioj ĉe CE de BEA, nur se en la apartaj urboj ne estas koncernaj kluboj. La estraroj de sekcioj rilatas ĉefe metodike al la kluboj pere de la estraroj de komunumaj societoj. Ankoraŭfoje oni devas substreki, ke la societo estas la baza organiza unuo kaj la membroj de la kluboj pagas membrokoton en la koncerna societo, kie ili partoprenas la organizaĵajn kunvenojn, rajtas elekti kaj esti elektataj. ●

Por realigo de pli proksimaj ligoj kaj helpado al la societoj estas organizantoj en la regionoj, kiuj periode

informas ankaŭ la CE resp. la Komisionon pri Organiza Agado pri la vivo kaj aktiveco de la societoj en la koncerna regiono.

La E-kulturdomoj havas aŭtonomajn planojn, estas finance subtenataj de CE de BEA kaj entute akordigas sian agadon kun la lokaj societoj, kun la Centra domo pri E-kulturo en Sofio kaj la Komisiono pri Kultura Agado.

Oni pridiskutis ankaŭ la demandon pri la instrulaboro, la neceson de pli aktiva iniciatemo flanke de societoj rilate la organizado de E-kursoj por komencantoj kaj direktadon de apartaj esperantistoj al kursoj por progresintoj kaj aliaj specialaj kursoj en la Internacia E-Kursejo en Pisanica. Tiel estas substreka la bezono plialtigi la lingvonivelon de la esperantistoj, kio estas necesa kondiĉo donanta pli grandajn eblecojn informi pri la vivo en nia lando la eksterlandajn korespondantojn, kaj aparte pri profesia orientiĝo, korespondado, spertinterŝanĝo, teknologioj, sciencaj demandoj.

Post ĉiu prelego en la seminarioj okazis viglaj diskutoj. La ĉeestantoj interŝanĝis pozitivan sperton, starigis multajn demandojn, faris kritikajn eldirojn kaj kreajn proponojn. Denove oni starigis la demandojn pri la eldono de granda Esperanto-Bulgara Vortaro, pri pli multe da bela kaj scienca literaturo en Esperanto, tiel ankaŭ pri la organizo de kurso de Esperanto pere de la radio kaj televido kaj pri restarigo de la regulaj radio-elsendoj de novaĵoj en Esperanto.

Ankaŭ estis substrekite, ke societoj — kiuj ne havas regulan organizon agadon, ne donas regule raportojn kaj ne havas iniciatojn — ne meritas ricevi financon subvencion de CE de BEA! En kazoj, ke la estraro aŭ iu el la estraranoj kulpas, oni rekomendas ne atendi la jarkunvenon kaj ĝustatempe entrepreni anstataŭigon per pli aktivaj esperantistoj!

Kiel oni emfazis la neceson pri pli regula ligo kaj informo flanke de la societoj rilate la Centran Estraron, tiel

ankaŭ oni memorigis, ke la Kancelario de CE ne ĉiam ĝustatempe respondas al leteroj kaj demandoj de la societoj.

Estis esprimita ankaŭ la komuna opinio, ke similaj seminarioj estas tre gravaj por efektivigo de la interligo de membroj de CE de BEA kaj de la societoj. Oni eldiris deziron sisteme organizi similajn simpoziojn komence de ĉiu kalendaro jaro.

Meze de 1990 okazos la 42-a Kongreso de BEA. Es-

tas ideo kombini la kongreson kun amasa renkontiĝo de esperantistoj, dum kiu okazu kunvenoj laŭ profesioj kaj intereso, kulturaj manifestiĝoj, prelegoj...

La Komisiono pri Organiza Agado alvokas ĉiujn esperantistojn unuigitajn en la diversaj asociaj ĉeneroj mobilizi siajn fortojn kaj per utilaj kaj interesaj iniciatoj digne renkonti la 42-an Kongreson de BEA!

Prof. d-ro Kiril POPOV,
Radoslav PARAŠKEVOV

Por ke ne sensaliĝu la salo...

Oni povas disputi ĉu la Esperanto-movado havas propran ideologion, des pli — rilate la signifon de la termino mem. Sed neniu rajtas refuti la fakton, ke la movado naskiĝis sub la „sankta stelo de l'espero" por pli feliĉa estonto de la homaro, por forigo de la milito en la civilizita mondo. Jes, nome tiu ĉi *idealo*, kvankam „nekompleta" ideologio, inspiris la unuajn kaj entuziasmigis la nunajn adeptojn el malsamaj landoj, partioj, religioj kaj rasoj.

Ĉiu bulgara esperantisto devus konscii, ke ankaŭ en nia lando Esperanto ekde la unuaj paŝoj eniris la batalon de la progresemaj fortoj, ke ankaŭ nun bulgaraj esperantistoj apartenas al la fidela kohorto de la pacbatalantoj-konstruantoj de la nova socio, agantoj de la socialisma renovigo. Sed tamen, ĉu ĉio estas en ordo? Ĉu la aparteno al la Bulgara Esperantista Asocio nepre signifas rekoni kaj sekvi de la idealisma radiko?

Ŝanĝiĝis la vivkondiĉoj, pliriĉiĝis la eblecoj, intereso kaj ties motivo. Iam oni aliĝadis al ni pro pure idea-

listaj streboj. Al ili ni proponis amikecan medion, ellanon kaj korespondan praktikadon de Esperanto, klerigajn kaj amuzajn kunvenojn kaj... nenian specifan privilegion — ekz. facilan vojaĝon eksterlanden. Hodiaŭ granda parto de novbakitaj samideanoj membriĝas ĉe ni precipe pro la fakto, ke ni havas bone organizitan turistan organizaĵon kaj aliajn eblecojn por certigi relative facilan kaj agrablan veturadon al aliaj landoj, des pli — en medio, kiu mankas ĉe aliaj oficialaj turistaj agentejoj. Ĉu ni preterpasos tiun fakton sen la farendaj konkordoj?

Ne estas danĝere, se turistaj eblecoj kaj „privilegioj" altiras novajn membrojn en niajn societojn. Ja tio substrekas, ke ni ne vivas ekster la praktikaj intereso de la nuntempa homo. Malbone estas tamen, se la dirita motivo restas sola kaj unika, se oni neglektas la kompletan celaron, kiu troviĝas en la Statuto de nia Asocio. Se la nova generacio preterpasas la idealisman fonton de nia movado, ne konas ĝian instruan historion; se ĝi interesiĝas nur pri alilandaj ekskursoj kaj neglektas iniciatojn, kiuj celas enprofundiĝon pri la esenco de la esperantismo; tiam nia movado malriĉiĝos. Tiam ĝi transformiĝos en aron da kotizantoj kaj en nenion pli. Feliĉe, la bildo ne estas tiel senesperiga. Sed oni devas vidi la faktojn kaj antaŭvidi eliron.

Jes, ni organizas kaj organizos ekskursojn. Aperis ankoraŭ pli favoraj kondiĉoj por tio. Sed la gamo de niaj iniciatoj devas esti sufiĉe larĝa, por respondi adekvate

al la esencaĵoj celoj de la movado kaj al la ĉiam pli larĝaj interesoj de la membraro. Ekde la unua leciono (ronda kaj kursa) la instruatoj devas ekĉerchi konojn kaj impulsojn pri la Statuto, pri la komenco kaj etapoj de la movado. Ĉu estus sensignifa edukmaniero diskonigi faktojn pri la abnegacia agado de la pioniroj, de la batalantoj, kiuj oferis

eĉ sian vivon sub la battoj de la obskurantismo? Riĉa estas nia historio ĉirilate. Kiomfoje ni organizis renkontiĝojn kun ankoraŭ vivantaj agantoj, kies rakonto malfermus antaŭ ni la heroan bildon de la pasinteco kaj helajn perspektivojn por la estonto? Kial do, apenaŭ dum la triagrada ekzameno oni devas respondi pri la "konciza

historio de la internacia kaj bulgara E-movado"?

En kursoj, rondoj kaj kunvenoj, ne nur dum sporadaj amuzvesperaj skeĉoj oni devas pritrakti ĉi-supran problemaron. La eduka laboro ne devas ĉesi.

Por ke ne sensaliĝu la salo...

Hristo MANOLOV
Polski Trâmbeș

Proponoj pri nova statuto de BEA

Proksimiĝas la 42-a Bulgara E-Kongreso. Do, ni devas prepari sin ĉiuflanke, precipe por la renovigo de nia Asocia statuto, kiu estas la konstitucio de nia movado. Mi esperas, ke la samideanoj havos siajn vidpunktojn, kiuj donos eblecon fari la statuton pli taŭga al nia nuntempo.

Mi dezirus starigi al samideanoj, kiuj interesiĝas pri tiu problemoj, kelkajn proponojn:

1. Loka societo devas elekti dum siaj balotkunve-



70 jarojn Esperanto en Orjaĥovo



Lige kun tiu evento en la urbo okazis solena kunveno de la loka E-societo. Ĉeestis prezidanto de fako „Kulturo kaj klerigo” — Orjaĥovo, 80-jara veterano Doĉo Vasilev,

Peter Voigt el GDR kaj Ilko Suvilehto el Finnlando. Ili salutparolis kaj bondeziris estontajn sukcesojn al la lokaj esperantistoj. Poste N. Bosaŝka raportis pri E-movado en Orjaĥovo de 1910 ĝis nun. En 1919 oni fondis E-societon „Guto”, poste alinomita „L. L. Zamenhof”. En 1976, laŭ propono de E-veterano el Vraca R. Triĉkov, la societo akceptis la nomon de Georgi Stanev — unua disvastiganto de Esperanto en Orjaĥovo. Por la gastoj el Blagoevgrad (junulara grupo), Godeĉ, Ŝumen, Svoge, Gabrovo, Ruse, Lom estis donacoj, kaj al la lokaj aktivuloj oni enmanigis premiojn.

La amuza programo estis sufiĉe riĉa. Okazis konkursoj pri beleco. La ludojn „Rapidaj, kuraĝaj, lertaj” oni organizis sur la urba plaĝo.

Al ĉiuj plaĉis la belarta programo, pleje — la plenumoj de la infangrupo kun gvidantino Rumjana Bogdanova.

N. BOSAŜKA



noj nur prezidanton. Li en daŭro de unu monato, en la sekva kunveno, devas prezenti la nomliston de siaj helpantoj, nome la estraron. La kunveno havas la rajton rifuzi iun kandidaton, kaj la prezidanto estas devigata, anstataŭigi lin kun alia akceptebla kandidato.

Vere, la prezidanto estas baza figuro, kiu direktas la societan agadon kaj li devus havi la rajton elekti siajn kunlaborantojn. Alimaniere povas ofte okazi, ke liaj „kunlaborantoj“, altruditaj pro diversaj kaŭzoj al la estraro povas plenumi la rolon de „bremsoj“ en la agado de la estraro.

La aprobo de la prezidanto ĝenerale prezentas la volon de la kunveno kaj la pluralismo poste devas realiĝi en la kolektivo agorde formita de la prezidanto, helpe de dua kunveno.

La prezidanto devas esti aprobita de la Centra Estraro de BEA unu monaton post la balotkampanjo (post lia elekto!).

2. En la societaj estraroj devas esti elektataj nur esperantistoj, posedantaj almenaŭ duan gradon. Tio evitos la influon de neesperantistaj opinioj al la estraro kaj ankaŭ garantias la Esperton de la elektotoj, kaj ties deziron labori por la movado.

3. Membroj de E-societoj



POR EGALECO EN LA

Vigla laboretosoj kaj modela organizo — estas la ĉefaj karakterizoj de la 74-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto k. j., ĉe nekutima varmeco en Britio. Loko de la Kongreso estis Brajtono — plej granda feria kaj fama kongresurbo, kaj kongresejo — Brighton Centre, — bonega konferenco kun altkvalitaj teknikaj servoj kaj kun profesieca skipo por okazigo de diversspecaj aranĝoj. Kongresa temo estis „Lingvo kaj egaleco en la internacia komunikado“. Partoprenis ĉ. 2250 personoj el 52 landoj, el kiuj ankaŭ 40 bulgaroj.

Alta protektanto de la Kongreso estis Lordo Wilson de Rievaulx, eksa ĉefministro de Britio.

LANĈO

La ceremonia Lanĉo de la Kongreso okazis la 28-an de julio en la impona halego Guildhall (Gildohalo) de la urbdomo de civito Londono. Ĉeestis pli ol 200 kongresanoj, honoraj gastoj kaj ĵurnalistoj. En la sama halo antaŭ 82 jaroj, post la 3-a Universala Kongreso, Zamenhof faris faman paroladon, en kiu li pledis por nova koncepto de la patriotismo, kiu rekonus la kunfratecon de la homoj.

Post bonvenigoj fare de Humphrey Tonkin, nome de UEA, kaj de John Wells en la nomo de la Londona Esperanto-Klubo kaj brita E-movado, sekvis parolado de Lordo Rugby, reprezentanto de la parlamentanoj-subtenantoj de Esperanto en Britio.

En sia festparolado la prezidanto de UEA H. Tonkin emfazis, ke la revo de Zamenhof — pri mondo, en kiu eblus ami sian patrion, sen ke tiu signifus malestimon al aliaj popoloj — estas ligita kun la kongresa temo. Sed respekto al aliaj popoloj ankoraŭ ne kondukis ĝis kompreno pri la lingva problemo en la mondo. Multaj opinias, ke tiu problemo estas per la angla lingvo finsolvita. Tamen se oni akceptus la anglan kiel mondlingvon, tio signifus anstataŭigi unu specon de koloniismo per alia. Fine Tonkin alvokis, ke ni konfirmu nian kredon je la taŭgeco de Esperanto kaj batalu por sendiskriminacia komunikado.

Poste salutis diplomataj reprezentantoj. Prof. Wells voĉlegis la skribajn bondezirojn de Lia Reĝa Moŝto Princo Eduard, plejuna filo de la reĝino, kaj de aliaj britaj eminentuloj. La Lanĉo finiĝis per deklamado en Esperanto (Simo Milojeviĉ) kaj en la angla (Mark Fettes) de speciale verkita poemo de William Auld. Post la ceremonio okazis akcepto en Guildhall por ĉiuj partoprenantoj.

INAŬGURO

Post muzika preludo — piana plenumo de Elena Puňova (USSR), kaj bonvenigo de la tradicia brajtona anoncisto, H. Tonkin per martela frapo malfermis la 74-an Universalan Kongreson. Sekvis salutparolo de J. Wells, prezidanto de Loka Kongresa Komitato kaj de la urbestro de Brajtono. Inter la salutantaj reprezentantoj de Landaj kaj Fakaj Asocioj ĉe UEA en la nomo de BEA salutis ties prezidanto Sava Dălbokov. Estis anoncitaj la novaj Honoraj Membroj de UEA — prof. Stojan Ĝuĝev (Bulgario), Douglas Gregor, Alec Wenture kaj Norman Williams (ĉiuj el Britio).

INTERNACIA KOMUNIKADO

H. Tonkin faris sian adiaŭan paroladon kiel ĝisnuna prezidanto de UEA. Post revuo de la oficperiodoj (1974—80 kaj 1986—89), dum kiuj li prezidis la Asocion, Tonkin emfazis la unuecon kaj kontinuecon de la movado. Li atentigis la kolektivan respondecon de ĉiu esperantisto pri evoluigo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo. Esperanto jam multe progresis post la tempo de Zamenhof, sed la mondo dume ŝanĝiĝis. La lingvo estus vaste parolata nur tiukaze, se ni konvinkus la mondon, ke edukado al internacia kunvivado nepre postulos **neŭtralan** lingvan fundamenton.

KONGRESA TEMO

La 4-an de aŭgusto Dua Ĝenerala Kunveno traktis la kongresan temon „Lingvo kaj egaleco en la internacia komunikado”. Sub la gvido de d-ro Francois Lo Jakomo (Francio) okazis vigla diskutado, en kiu oni emfazis la fakton, ke ni vivas en epoko, dum kiu kiel neniam antaŭe sentiĝas grandega bezono de efika komunikado inter la homoj. La grandaj problemoj de milito kaj paco kaj de la ĥoma ĉirkaŭaĵo bezonas tujan kaj profundan pritrakton. Alte kreskis la deziro de la ordinarnaj homoj partopreni tiun debaton kaj konatiĝi kun la opinioj kaj ideoj en aliaj landoj. Tio ne estas facila, ĉar ili ne scipovas la lernitajn grandajn internacie disvastigitajn lingvojn. La nuntempa internacia komunikado estas baze malegaleca, ĉar ĝi donas avantaĝon al tiuj, kiuj parolas tiujn lingvojn denaske. Male, Esperanto pro sia facileco kaj neŭtraleco ebligas komunikadon inter la homoj, praktike ne atingeblan per la aliaj etnaj lingvoj, lernitaj kiel fremdaj lingvoj.

La diskutantoj faris multajn interesajn eldirojn kaj valorajn opiniesprimojn, kiuj poste trovis lokon en la Kongresa Rezolucio.

TAGO DE LA PACO

La Tago de la Paco ankaŭ ĉi-jare okazis sub la gvido de Yosimi Umeda (Japanio), vicprezidanto de UEA. Faris eldirojn kongresanoj el kelkdeko da landoj. La plimulto el ili (L. Medvedev, USSR; M. Mularney, Irlando; doc. Cv. Kardašev, Bulgario; Y. Umeda k. a.) estis dediĉitaj al la ligo inter la pacbatalo kaj la konservo de la naturmedio en la mondo. Oni rekomendis fondon de internacia esperantista ekologia federacio, kiu poste estis establita. Fine oni voĉdonis telegramon al la urbestro de Hiroŝima, esprimantan la subtenon rilate la unuan suferintan je atombombo urbon kaj saluttelegramon al la ĉefredaktoro de semajn-gazeto „Moskvaj Novaĵoj”, kiu aperigis numeron en Esperanto.

TAGO DE LA LERNEJO

Tiu programero pri temo „Meditado” okazis la 1-an de aŭgusto. Ĝin gvidis Stefan McGill (Nov-Zelando/Hungario), kiu en sia enkonduko parolis pri la ekstera kaj interna flankoj de motivado pri lernado de fremdaj lingvoj, kaj speciale de Esperanto. La motivadon ĉe la lernado de Esperanto ni devas serĉi emfazante ties realajn avantaĝojn ĉefe en formo de kulturaj, sociaj kaj amikaj kontaktoj. Do, en la instruado de la Internacia Lingvo oni devas akcenti tiujn eblecojn kaj direkti la lernantojn mem trovi ilin.

Sekvis opiniesprimoj de dekoj da personoj, aktivuloj de ILEI

devas esti nur sukcese finintoj de unuagrada kurso. La unua motivo por akceptado de nova membro devas esti posedo de diplomo unuagrada.

4. Necesas estigo de kategorio MEMBRO-SUBTENTANTO, kiuj havas konsilajn rajtojn, sed ne balotajn. Ili estos novicoj en niaj vicoj kaj bazo por la varbado de novaj gekursanoj, t. e. novaj membroj.

Tio tute ne prezentas vidpunkton de elektitaro, sed gravan postulon pri ideo-eduka laboro inter la kandidatoj por membriĝo. Alimaniere (tion bone montras la nuna situacio) la nivelo de la eduka laboro estas spontana, sed neefika, ĉar la plimulto de la edukitoj estas hazardaj membroj en nia movado, ofte neinteresataj pri unueco, disciplino ĝenerale kaj pri aktiveco en nia agado poresperanta.

5. La kluboj de la societoj ne devas havi la rajton de la nomo, flago, kaso kaj konto, stampo ktp. Ili funkcias kiel helpaj E-grupoj kaj ili povas organizi kunvenon de siaj geklubanoj nur traktante specifajn problemojn, rilatantajn al la fako de la sekcio.

6. La mandato de la societaj estraroj devas daŭri 2 jarojn, kaj de la Centra Estraro 3 jarojn. Oni devas akcepti la postulon, ke unuopa



persono povas mandati nur dufoje.

7. La kongreso devas okazi ĉiun trian jaron kaj dum la aliaj jaroj okazu regionaj renkontiĝoj. (Ekz. 1991 j. en Blagoevgrad, Miĥajlovgrad, Pleven, V. Târnovo, Razgrad, Varna, Burgas, Stara Zagora, Ĥaskovo, Plovdiv, Velingrad). Ĉiujare la lokoj devas esti diversaj. Oni devas organizi societajn aranĝojn en specialaj okazoj. Tio ne disigos la fortojn de la esperantistoj kaj samtempe donos eblecon pri pli vigla kaj rezultodona vizitado de la regionaj renkontiĝoj.

8. Oni devas forstreki la kondiĉon en la nuna Statuto — punkto 7, alineo 2. Devas resti nur tio: kiu ne pagis la membrokotizon duan jaron li ne rajtas plu membri en la societo!

Kompreneble tiu materialo ne pretendas pri tuŝo de ĉiuj problemoj, rilatantaj al la Statuto. Mi menciis aparte tiujn, kiuj rilatas rekte al la societoj, ties aktiveco, unueco kaj esperantisteco.

Laŭ mia opinio necesas kunsidi speciala komisiono antaŭ la Kongreso, konsistanta el aktivuloj ne nur de la centro (Sofio), sed ankaŭ de la pli viglaj kaj grandaj societoj de la provinco. Ĝi pridiskutu tiujn tre gravajn problemojn ne galope, sed atente kaj trankvile.

Ni devas havi perfektan kaj modelan statuton de BEA.

Hristo TONEV

kaj homoj el la ĉeestanta publiko, kiuj parolis pri menciindaj okazaĵoj, projektoj kaj eventoj en la E-instruado en siaj landoj. Aparte impresis la eldiroj de Audrey Childs-Mee (Nederlando), Irena Ŝancer (Pollando), Rene Triolle (Francio), Malcolm Jones (Britio) k. a.

ALIAJ PROGRAMEROJ

La 2-an de aŭgusto okazis debato pri temo „Ĉu Esperanto aŭ la angla lingvo estas solvo de la monda lingvo-problemo?“. Por la angla lingvo pledis prof. John Honey, profesoro pri angla lingvo, Universitato de Humamoto (Japanio), kaj por Esperanto — prof. John Wells, profesoro pri fonetiko, Universitato de Londono. La debaton prezidis prof. H. Tonkin. La argumentoj de prof. Honey estis, ke kvankam ne estas juste la angla nun estas fakte la lingvo de internacia komunikado, kaj se Esperanton efektive parolus dekoj da milionoj da homoj dise tra la mondo, ĝi fariĝus same malregula kaj disdialektiĝinta kiel la angla. Al tiu argumentado prof. Wells replikis, ke ni ne devas akcepti la mondon kia ĝi estas, sed ni klopodu ŝanĝi ĝin. Disdialektiĝo de Esperanto ne okazos en la mondo, kie la amaskomunikiloj pli kaj pli proksimigas la homojn.

Sub la gvido de prof. Richard H. Osborne (Britio) okazis la 42-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. Prelegis doc. d-ro Ingo Hofmann (FRG) pri temo „Transe de la atom-epoko“, d-ro Erich-Dieter Krause (GDR) pri „Ĉu Esperanto devas pliriĉigi sian vorttrezoron?“, d-rino Marjorie Boulton (Britio) pri „Iris Murdoch“, prof. Bengt-Arne Wickström (Svedio) pri „Merkato aŭ plano: kiel organizi la ekonomion?“, Janko Ŝtruc (Jugoslavio) pri „Fortiĝanta rolo de merkato en jugoslavia ekonomio“, d-ro Peter Chrdle (Ĉeĥoslovakio) pri „Problemaro de aŭtomatigo de la rangodeklivoj: teoriaj kaj praktikaj vidpunktoj“, d-ro Lev Medvedev (USSR) pri „Ekologia kaj geokemia signifo de plantara sorbo kaj elimino de substancoj“, d-ro Arpad Mathe (Hungario) pri „Pri la centjara Esperanto-gazetaro“ (li menciis i. a. la duan en la mondo E-gazeton „La Mondlingvisto“, aperintan en Bulgario, kaj revuon „Bulgara Esperantisto“ — unu el la multjaraj E-periodaĵoj en la historio de Esperanto kaj Povilas Jegorovas (USSR) pri „Litova E-movado: historia skizo, nuna stato, perspektivoj“.

La tradicia kaj populara Esperantologia Konferenco okazis sub lagvido de d-ro Detlev Blanke (GDR) la 3-an de aŭgusto. D-rino M. Boulton prelegis pri Zamenhof kiel kreinto de literaturaj precedencoj. Aleksandr Melnikov (USSR) prezentis semantikajn problemojn de Esperantaj leksemoj. D-ro E.-D. Krause komparis la afiksajn sistemojn de la indonezia lingvo kun Esperanto. D-ro D. Blanke skizis kelkajn proponojn pri la organizado de scienca esploro pri Esperanto je landa nivelo.

Oni prezentis du teatrajn spektaklojn plenumitajn de amatoraj trupoj el Britio kaj FRG — resp. moderna brita komedio „Kiel amas la aliuloj“ de Alan Ayckbourn (en traduko de W. Auld) kaj „Kato sur varma ladotegmento“ de Tennessee Williams. Okazis la tradiciaj Nacia kaj Internacia Arta Vesperoj, kaj ankaŭ Koncerto. Enkadre de la Junulara Vespero kantis slovaka rok-muzika grupo „TEAM“. En la Balo estis prezentita la unua kompakta disko de la nederlanda grupo „KAJTO“, kiu grupo plenumis kelkajn pecojn.

Okazis kursoj pri angla lingvo (instruis Alison Williams) kaj



pri kimra lingvo (instruis prof. J. Wells), kaj ankaŭ E-kursoj laŭ Zagreba kaj Ĉe-metodoj. Konversaciajn rondojn de progresantaj esperantistoj gvidis St. McGill.

Multaj fakaj E-organizaĵoj okazigis siajn fakkunvenojn: Akademio de Esperanto, Esperantlingva Verkista Asocio, Filozofia Asocio Tutmonda, Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, Internacia Fervojista E-Federacio, Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofonamatoroj, Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio, Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj, Mondpaca Esperantista Movado, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, Universala Medicina E-Asocio k. a.

LA BULGARA PARTOPRENO

En la nomo de Bulgara Esperantista Asocio partoprenis D. Papazov, prof. K. Popov, Iv. Ĉulev kaj M. Taŝeva. En la preparo kaj gvido de kunvenoj de fakaj E-organizaĵoj aktivis V. Oljanov kaj M. Bâcev (filologoj), D. Ĥitrov kaj E. Georgiev (ĵurnalistoj), D. Petrov (poŝtistoj), Iv. Ĉulev (artistoj), prof. K. Popov (medicinistoj). Sava Dălbokov parolis pri la bulgaraj kooperativoj en la 5-a Konferenco de Internacia Kooperativa Esperanto-Asocio. Aleksandar Zaĥarijev estis gvidanto en la 25-a Internacia Infana Kongreseto, okazinta samtempe en Brajtono.

Maria Kokareŝkova plenumis bulgarajn popolkantojn, kaj doc. Cv. Kardaŝev — rusan kanton esperante en la Internacia Arta Vespero. En la sama programero D. Terziev altnivele gvidis la Internacian E-Horon.

Okazis elektoj pri nova estraro de Universala Esperanto-Asocio. Prezidanto de UEA oni elektis prof. John Wells. Vicprezidantoj estiĝis So Gilsu (Suda Koreo) kaj Ulrich Lins (FRG), kaj ĝenerala sekretario — Osmo Buller (Finnlando). Estraranoj: Gregoire Maertens (Belgio), Spomenka Štimec (Jugoslavio), Roman Dobrzynski (Pollando), Oskar Princz (Hungario) kaj Ivo Durwael (Belgio).

Gajnintoj en la Belartaj Kursoj 1989 estas:

Poezio unua premio: Krys Ungar (Britio) pro „Balonoj”, tria premio: Neil Salvesen (Nederlando) pro „Dis” kaj Kris Ungar pro „Subterfervoja incidento”, honora mencio: Ulrich Becker (GDR) pro „Dorminto en valo” kaj Timothy Carr (Britio) pro „Ias abiturient”.

Prozo dua premio: Eugeno Belonenko (Sovet-Unio) pro „La blinda modlisto”, tria premio: Neil Salvesen pro „Feliĝo”.

Teatraĵo unua premio: Stefan McGill pro „Kaptito”, tria

premio: István Ertl (Hungario) pro „En kesto”.

Kanto premio An-okin: Janet Rawling Keitel (FRG) pro „Malgranda birdo”.

Fotografio tria premio: Anne-Liisa Ali-Simala (Finnlando).

Nova Talento Pokalo „Henry Harabaĝiu”, Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro la eseo „Originalaj romanoj en Esperanto: panoramo kaj perspektivoj”.

Infanlibro de la jaro 1988: „Anne Frank ne estas de hieraŭ” de Mies Bouhuys, en traduko kaj eldono de Nora Bartels.

Pokalon „Fyne” ĉi-jare ricevis Esperanto-Ligo de Norda Ameriko pere de sia prezidanto William Harmon pro kontinua progresado en la lastaj jaroj kaj pro sukcesoj en la disvastigo de Esperanto. La estraro de UEA aljuĝis Premion „Onisaburo Deguĉi” al Internacia Kultura Servo — Zagreb, Jugoslavio pro 20-jara utiligo de la Internacia Lingvo en siaj internaciaj kontaktoj, okazigo de Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) kaj lanĉo kaj evoluigo de la Zagreba Metodo — unu el la plej modernaj kaj efikaj sistemoj por instruado de Esperanto.

Per la trakto de la kongresa temo „Lingvo kaj egaleco en la internacia komunikado” kaj per sia laborprogramo la 74-a Universala Kongreso de Esperanto markis novan stadion en la utiligo kaj popularigo de la Internacia Lingvo. En internacia skalo

pere de ĝi oni efektive povus realigi egalecan komunikadon, ĉar pro sia neŭtraleco Esperanto ne donas avantaĝon al iu nacio aŭ lando.


Brajtono — Sofio

Evgeni GEORGIEV

Internacia Junulara Kongreso

16 - 23 julio 1989

Kerkrade - Nederlando



La urbo, kiu gastigis ĉi-jare la 45-an Internacian Junularan Kongreson, havas multajn nomojn — muzikurbo (pro la Monda Muzik-konkurso, kiu okazas ĉiun kvaran jaron), statuourbo (pro la pli ol 80 skulptaĵoj, kiuj estas troveblaj tra la tuta urbo), verdaĵurbo (ĉar post la fermo de minejoj en 1966 ĝi adiaŭis por ĉiam sian aspekton de nigra minejurbo kaj havas multajn verdajn pulmojn: urboparkojn, botanikan ĝardenon, arbaretojn ĉirkaŭ la Abatejo Rolduc ktp.), futbalurbo (ĉar ĝi estas la sidejo de nederlanda futbalteamo „Roda“, kiu ĉi-jare ludis kontraŭ la bulgara CFKA „Sredec“).

Tamen la vera nomo de la kongresurbo estas KERKRADE, kio en nederlanda lingvo signifas „preĝejo en Rode“. (**Kerk** estas preĝejo, **Rode** = nomo de vilaĝo, apud kiu en 960-a jaro de n.e. oni konstruis la unuan preĝejon en la regiono; la origina formo „Kerk in Rode“ poste fariĝis „Kerkrade“).

Kerkrade troviĝas en la plej suda parto de Nederlando, en provinco Limburgo. Kvankam la „lando de tulipoj“ situas grandparte sub la marnivelo, la regiono de Kerkrade estas sufiĉe alta kaj monteca. La urbo, konata ankaŭ kiel la plej eŭropa parto de Nederlando, havas proksimume 55000 loĝantojn kaj estis ĝis 1965 (kiam oni fermis la minejojn) la plej malnova minejurbo en Eŭropo.

En Kerkrade menciinda kuriozaĵo estas la strato „Nieuwstraat“, meze de kiu troviĝas la ŝtatlimo kun FRG. Unu flanko de la strato estas nederlanda, la alia — germana.

Jan Koszmaluk (Pollando)
Jves Bellefeuille (Kanado)
Louise Frith (Britio)
Hardo Bourguignon (Nederlando)
Torsten Bendias (GDR)
Saskia Jdzerda (Nederlando)
Claude Rouget (Francio)

— prezidanto,
— vicprezidanto,
— ĝenerala sekretario,
— kasisto,
— estrarano pri aktivula trejnado,
— estrarano pri informa agado,
— estrarano pri servoj.

DISTRA PROGRAMO

La drama grupo de Zagreba Esperanto-Klubo prezentis teatraĵon „Kunveno de birdoj“ de Carrière, kiu estis alegerio pri homa feliĉo. La teatra grupo „Kia Koincido“ el FRG surscenigis la dramon de Tennessee Williams „Kato sur varma ladotegmento“. Verŝajne sub la influo de la muzika etoso de Kerkrade (la tradicia Monda Muzika Konkurso okazis samtempe kun la IJK), la programo abundis je koncertoj: laŭtradicie partoprenis la Internacia koruso kaj la Internacia orkestro.

Oni ĝuis ankaŭ la muzikon de Colada Tropical (nederlanda muzikgrupo), TBC (hungara grupo uzanta diversajn popolmuzikajn instrumentojn), rokbando „Persone“ (sveda rokgrupo), la internacia rokgrupo „Amplifiki“, la tre konata rokensemblo el Ĉeĥoslovakio „TEAM“ kaj aliaj. Meritas atenton la dancgrupo el Nijmegen „La mokiindaj Preciozulinoj“, kiu prezentis menuetojn en Rokokostilo, valsojn kaj mazurkojn el la Biedermeier-periodo.

Estis organizitaj laborgrupoj pri balaj dancoj, paperfaldarto, klakdancado, gipsmaskoj, kroketo, korpa esprimado, ĵonglado, goo-ludo, bumerango, memdefendado, nederlanda lingvo kaj aliaj.

La kongresa temo estis „Transporto“, tamen oni ne sukcesis bone prezenti ĝin. El la 14 prelegoj nur kelkaj meritis atenton.

TEJO — Komitato

TEJO jam pligrandiĝis. Al ĝi aliĝis la Junulara sekcio de Kuba Esperanto-Asocio.

La komitato de TEJO pridiskutis la perspektivojn pri sia estonta laboro kaj elektis novan estraron:

Dimităr DIMITROV



FERVOJISTA FORUMO

La 41-a Kongreso de Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio okazis da la 13-a ĝis la 19-a de majo 1989 en famekonata restadejo Salou, Hispanio. La Kongreso koincidis kun granda evento — la 80-jariĝo de IFEF.

Dum septembro 1909 en Barcelona — ankaŭ Hispanio, fervojistoj el 6 landoj sub la gvido de franca kolego Armand Berlande fondis la Internacian Asocion de la Esperantistoj Fervojistoj. Ĝis nun nia Federacio progresas kaj kreskas. En ĝi membras 23 landoj de Eŭropo kaj Azio. IFEF ĉiujare organizas siajn kongresojn. La unua okazis en 1949 en Arhus, Danlando. Bulgario estis dufoje kongreslando — en 1968 — Varna kaj en 1984 — Suna Bordo.

El Bulgario 11 fervojistoj el Sofio, Plovdiv, Stara Zagora kaj Burgas partoprenis ĝin. Kongresis ĉ. 500 delegitoj el 19 landoj.

Post amika kaj agrabla Interkona Vespere, dimanĉe la 14-an de majo okazis solena malfermo de la 41-a IFEF-Kongreso en impona kongrespalaco „Galas“. Post salutvortoj de la aŭtoritataj gastoj sekvis paroloj de 19-landaj reprezentantoj. Nome de la bulgaraj fervojistoj-esperantistoj, la kongreson salutis Georgi Litov. La vicon de paroloj finis Joachim Giessner, prezidanto de IFEF, kiu parolis pri la 80-jariĝo de fervojista E-movado kaj solene malfermis la 41-an IFEF-Kongreson.

Jarkunveno de UMEA

Enkadre de la 74-a UK en Brighton okazis je la 31-a de julio la 28-a jarkunveno de UMEA. Partoprenis 38 sanlaboristoj el 15 landoj. La kunsidon gvidis prof. d-ro Kiril Popov (Bulgario) — vicprezidanto de UMEA, bazan raporton faris d-ro J. Ferenczy (Hungario) — prezidanto de UMEA. Li ankaŭ informis pri la du premiitoj de Shinoda-premio de UMEA — doc. d-ro Sugeno Kucharz (Pollando) pri lia Malgranda Medicina Vortaro, kaj d-ro Balazs Szemök (Hungario) pro lia kontribuo en la stomatologia sekcio de UMEA. D-ro

Okazis po du komitat- kaj plenkunsi-doĵ, en kiuj oni diskutis kaj akceptis raportojn de la vicprezidanto, kasisto, redaktoro k. a. Ankaŭ oni diskutis kaj akceptis novan statuton de la Federacio. Estis elektita nova sekretario de IFEF — Romano Bolognja el Italio. En Terminara Komisiono Ritterspach (FRG) fiere raportis, ke Terminara Vortaro, rezulto de 30-jara laboro estas jam preta. Ĝi devas esti tradukita nacilingve de landaj sekcioj.

Okazis interesaj fakprelegoj. La ĉefa estis „Projekto pri fervoja kunligo per internacia ŝpuro inter Francio kaj Barcelono“. La projekto celas plenumi malnovan aspiron: kunligi la hispanan kaj la eŭropan fervojreton sen interrompo. La aŭtoro de la raporto montris la neceson pri kunligo de Hispanio kun la Eŭropa Komunumo kaj kreskigi la fervojan cirkuladon de pasaĝeroj kaj varoj tra la tuta Eŭropo. Estis trovita la plej konvena ekonomia kaj teknika alternativo kunligi Hispanion kun la eŭropaj fervojaj retoj. Fakprelegojn faris ankaŭ svisoj, jugoslavoĵ k. a.

Dum la kongreso okazis tri interesaj ekskursoj, internacia balo, arta kaj folkloravespereĵoj k. a.

La Kongreso resumis la fervojistajn klopodojn pri solidareco kontraŭ milito, demonstris la volon pri paco kaj interkompreniĝo. Ĝojo kaj kontenteco regis dum la Kongreso.

La 19-an de majo estis solene fermita la 41-a IFEF-Kongreso. La hispanaj gekolegoj transdonis la standardon al norvegaj fervojistoj — dommastroj de la venonta 42-a IFEF-Kongreso, kiu okazos en u. Hamar, Norvegio.

Georgi LITOV

Sakata (Japanio) faris la finanĉan raporton. La ĉeestantoj pridiskutis la tagordon kaj koncize informis pri siaj enlandaj laboroj. Post la informo pri la pasinta jam 7-a IMEK en Kortrijk (Belgio), venis por la 8-a IMEK (1991) tri kandidatiĝoj (Ĉinio, Bulgario, Litovio), kaj la Estraro de UMEA post 3—4 monatoj anoncos la decidon. Dum la kunsido estis disdonita la informilo de UMEA — „Medicina kuriero“ kaj oni abonis ankaŭ por „Medicina Internacia Revuo“.

prof. Kiril POPOV



LABORO KAJ DISTROJ EN PLEVEN

Tradicie en Bulgario estas organizataj trisemajnaj junularaj laborbrigadaj en Sâdievo kaj en Pleven. Ĉi-jare mi vizitis la laborbrigadon en Pleven kaj renkontiĝis tie kun ĝiaj membroj kaj ĉefoj. La 67 brigadanojn prizorgas estro, vicestro, kuracisto, kontisto, administranto, respondeculo pri la kultura programo, dumnokta gardisto ktp. Fakte tio estas nur kelkaj el la roloj de nur du personoj: Ivajlo Ĥristov, kaj Mariana Dikova, kiuj, krome, ĉiutage laboras ĉe la ĉenstablo kune kun la brigadanoj. Mariana Dikova partoprenas unuafoje, dum Ivajlo Ĥristov estas unu el la iniciatintoj kaj kunfondintoj de la aranĝo, kiu pro profesia okupiteco dum la lastaj du-tri jaroj ne ĉeestis. Ili ambaŭ prenis sur sin la malfacilan taskon, preskaŭ sendorme labori por sukcesigi la aranĝon.

Jen kion rakontis Mariana Dikova: „La internacia esperantista junulara laborbrigado en Pleven jam estas tradicia. Por la unua fojo ĝi okazis en 1983. Ĉi-jare en ĝi partoprenas gejunuloj el kvin landoj: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Pollando kaj Sovetunio.

La unua labortago estis la 1-a de aŭgusto. Ni laboras en konservaja fabriko, en du skipoj. La laboro ne

estas tre peza, kaj kiu bone laboras, ankaŭ bone gajnas.

Sur tri tabuloj — „Anoncetoj“, „Distroj“ kaj „Nia informilo“ — ĉiutage aperas diversaj sciigoj, faktoj pri Esperanto ktp. Estas organizitaj E-kursoj por ĉiuj, kiuj volas lerni kaj perfektigi en la lingvo.

La distra programo estas abunda kaj alloga. Ni vizitis multajn koncertojn, muzeojn, ekspoziciojn, la Plevenan Panoramon, ktp. Tre plaĉis la koncertoj de la sovetia hardrok-grupo „Sprut“ kaj de la konata jugoslavia kantisto Vlado Kalember. Okazis ekskursoj al Veliko Tŕrnovo, Ŝipka, Etŕra kaj Gabrovo. Priĉepe interesaj estis la etnografia muzeo Etŕra, kie ni konatiĝis kun malnovaj bulgaraj metioj, kaj la monumento Ŝipka.

Tuj post la alveno de la partoprenantoj okazis Internacia Vespere en la studenta domo en Pleven. Dum la oficiala malfermo nin kunigis la tendara fajro. Ĉiuvespere estas organizataj diskotekoj. La atmosfero estas amika kaj agraba vere por ĉies gusto.

Ĝenerale, la partoprenantoj en la aranĝo eĥis pri ĝi tre pozitive. La slovaka grupo laŭdis la bonan organizon de la laboro kaj la zorgemon de la gvidantoj.

Sian kontenton esprimis ankaŭ la partoprenantoj el Volgodosk.

Ĉi-jare en Pleven denove ĉeestas la kvar poloj, kiuj pasintjare publike plendis kaj promesis neniam plu partopreni la laborbrigadon. Mi ne intencas refuti iliajn plendojn; tion faris ili mem, venante denove al Pleven.

La ĉefa manko de la aranĝo laŭ mi, estas, ke plejparto de la partoprenantoj ne parolas Esperanton, kvankam en siaj aliĝiloj ili asertas esti esperantistoj. Tio kaŭzas multajn malfacilaĵojn kaj por la brigadanoj, kaj por la gvidantoj, kiuj devis paroli bulgare, ruse, pole kaj — nur foj-foje — en Esperanto. Sed mi ne kuraĝas imagi, kio estus okazinta, se estus venintaj azilingvanoj! Mi opinias ke la enkonduko de Esperanto kiel oficiala lingvo almenaŭ dum esperantistaj aranĝoj, estas tasko solvinda kaj solvenda, kvankam ne tro facile solvebla (ĉar tio dependas de la partoprenantoj, kaj ne de la organizantoj). Ĉu oni devus puni la venantajn neesperantistojn, aŭ iumaniere premii la lingvoparolantojn? Kiu havas taŭgan proponon, informu nin!

Ĉetere, venontjare ĉiu povus mem sperti la etoson de junulara esperantista labortendaro, se li/ŝi aliĝos. La aliĝiloj kaj pliaj informoj pri la partoprenkondiĉoj baldaŭ aperos.

Mariana PETROVA

HELPON!

Ĉirkaŭ 130 bulgaraj gejunuloj partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Krakovo (Pollando) en 1987, 32 vizitis la Zagreban Kongreson en 1988 kaj nur 6 ĉeestis la 45-an Internacian Junularan Kongreson en Kerkrade (Nederlando). Fakte gejunuloj estis 4, ĉar du (bedaŭrinde) ne plu apartenas al la junulara aĝo. En 1988 la novelektita estraro de BEJ proponis al siaj gekolegoj de Nederlanda Esperanta Junularo kontrakton pri persontaga interŝanĝo de gejunuloj, sed BEJ ricevis reagon nur kelkajn tagojn antaŭ la kongreso. Ĝi fakte estis konfirmo, ke NEJ ricevis la proponon de BEJ kaj ke oni esploras la eblecon. Paralele al tiu iniciato, la sekretario de BEJ — V. Ĝenĉev, traktis kun la Agentejo por Junulara Turismo „Orbita“. Bedaŭrinde „Orbita“ ne akceptis organizi vojaĝon al Kerkrade.

La perspektivo por la sekvonta Junulara Kongreso, kiu okazos en Playa Giron (Kubo), ne estas optimisma. Nur la aviadbileto kostas ĉirkaŭ 1200 levojn. ĈU LA NOVA FIRMAO „ESPERANTO-TURISTO“



Grafikaĵo: Dimitŕr DIMITROV

SUKCESOS CERTIGI FAVORAJN KONDIĈOJN POR PARTOPRENO EN LA 46-A JUNULARA KONGRESO? Malfeliĉe tio ne okazis pri la kongreso en Kerkrade. ĈU BEJ-ANOJ KONGRESOS EN KUBO?

BEJ — estraro

Al ĉiuj E-societoj kaj kulturdomoj

Cele al plialtigo de la nivelo de kultur-kleriga agado en E-societoj kaj ties kluboj pri profesioj kaj interesoj, Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA proponas liston de kvalifikitaj lektoroj-esperantistoj, kiuj estas pretaj prelegi antaŭ publiko de esperantistoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo.

Pri la invito de la lektoroj zorgos la respondeculoj pri kultura agado en la estararoj de la E-societoj. Por tiu celo necesas starigi kontaktojn kun la dezirata lektoro. La E-societo prenas sur sin la devon pagi la vetur- kaj tranoktkostojn. La Centra E-Kulturdomo en Sofio certigos pagon de tagmonoj kaj de koncerna honorario.

La E-societoj devas plani por 1990 en sia buĝeto monrimedojn ankaŭ por invitado de lektoroj.

Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA

NACIA E-GRUPO DE PRELEGISTOJ

1. **ABAĜIEVA, Neli** — Sofio, str. „Rajko Ĵinzifov“, bl. 11, vĥ. 4.

Per Esperanto tra la mondo

(impresoj el Japanujo, Bolivio, Venezuelo k. a., kiel apartaj prelegoj)

2. **ALEKSIEV, Nikola** — Sofio, kv. „Iz-

tok“, bl. 1, vĥ. 2, tel. 72 21 32.
Politikaj kaj sociaj temoj

3. **ARNAUDOV, Petko** — 4400 Pazar-
ĝik, str. „Nikifor Popkonstantinov“ 40,
tel. 034 — 2 37 01.

Esperanto kiel solvo de la problemoj pri

internacia lingvo

D-ro L. L. Zamenhof — vivo kaj kreado
Esperanto en la regiono de Pazarĝik

4. **BELEVA, Belka** — 1000 Sofio, bul. „Marŝal Tolbuĥin“ 45, tel. 89 72 95.
Bulgara Esperanto-Teatro
Agado de la Virinaj komisionoj de BEA kaj UEA
Apliko de Esperanto en teatro

5. **BONEV, Petko** — 6000 Stara Zagora, str. „Aŭgusta Trajana“ 17/16, tel. 042 — 2 96 17.
25 tagojn en Japanio

6. **BOJAĜIEVA, Eva** — 4000 Plovdiv, str. „Akad. Derĵavin“ 1, tel. 032 — 22 72 28.
Lingvaj demandoj
Kiel la organismo produktas energion
La principo de ekonomio en la organismo

7. **BOJAĜIEV, Nikolaj** — 4000 Plovdiv, str. „Akad. Derĵavin“ 1, tel. 032 — 22 72 28.
Lingvaj demandoj

8. **CVETKOVA, Vasja** — 1150 Sofio, kompl. „Mladost“, bl. 16, vĥ. 2.
Impresoj el Japanio
Nederlando — landoĝardeno (impresoj pri vizito)

9. **ĈENKOVA, Stefka** — 1303 Sofio, bul. „Ĥristo Botev“ 97, Bulgara Esperantista Asocio
Trifon Ĥristovski — vivo kaj agado
Mia amata lingvo Esperanto
Ni lernu Esperanton ludante

10. **DENEVA, Daniela** — 1592 Sofio, Geofizika Instituto de BAN, str. „Akad. Georgi Bonĉev“, bl. 3, ofica tel.

71 31 (interna 33 35)

Kaŭzoj kaj prognozado de la tertremoj
La tertremoj en la Balkana Duoninsulo

11. **DRAĴEV, Kiril** — 1592 Sofio, kompl. „Druĵba“, bl. 127/8, tel. 79 24 12.
Impresoj el Ĉinio
80 tagojn sur la ondoj de Atlantiko
„Kredu min, sinjorino“ (literatura temo)

12. **D-ro DONEV, Nikola** — 1113 Sofio, str. „Anri Barbĵus“ 22, bl. 131, tel. 72 59 05
Disvolvo de la homaj kapabloj
La homa mieno kiel esprimo de la sanstato kaj kiel rimedo de komunikado
Popola kaj oficiala medicinoj
Ronkado kaj sano
Rimedo kontraŭ tuso
La zorgoj por la nazo kaj la gorĝo
La malsanoj de la vejnoj
La bazo de la longvivado
Medicino kaj superstiĉoj
Zorgoj pri la koro
La nestabila ŝanĝiĝa sanstato
La haŭto kaj la sano
La aideso (akirita imuno-deficita sindromo) — vipo de nia epoko

13. **GOROVA, Maja** — 1504 Sofio, str. „San Stefano“ 23/A, tel. 44 15 56.
La nuntempa bulgara arto
Tra Japanujo (kun diapozitivoj)
Impresoj el Ĉinio (kun diapozitivoj)

14. **HAGĴEV, Dimitâr** — 1113 Sofio, kompl. „Lenin“, bl. 4, tel. 72 91 26.
La batalo por paco kaj la partopreno de la esperantistoj en ĝi
La rolo de MEM
La paca kunvivado — universala principo de la internaciaj rilatoj
La internaciaj vortoj en la bulgara lingvo kaj en Esperanto

15. **HITROV, Dončo** — 1000 Sofio, str. „Ĥan Asparuĥ“ 61, tel. 88 30 82, 67 25 79.

Kiel efike propagandi kaj varbi por Esperanto

Esperanto en la filmarto (kun projekciado de E-filmoj)

La Esperanto-ĵurnalismo (preparado de kadroj kaj praktika aplikado)

ILEF kaj TEĴA — unuigintaj ĵurnalistaj organizoj (historio, akiraĵoj, taskoj)

La esperantistaj laborbrigadoj ĉe ni (historio, organizado, atingoj)

16. **IGNEV, Cano** — 1000 Sofio, str. „Ĥaĝi Dimităr“ 17, tel. 88 13 39, tel. en Loveĉ 068 — 20 63.

La morala kodo de la bulgara esperantisto

17. **KOLEVA, Lili** — Sofio, bul. „Cvjatko Radojnov“ 10, bl. 2, vĥ. 2, ap. 34, tel. 44 49 62.

Pri la amikeco kaj korespondado

Miaj impresoj pri Esperanto-vojaĝoj en eksterlando

18. **KOSTOVA, Cvetana** — 1111 Sofio, str. „Lidice“ 22, vĥ. 6, tel. 71 68 23.

„Pirata“ instru-metodo de Esperanto

Ĉe-metodo de E-instruado

Lingvolaboratoriaj kursoj de Esperanto en Sombatĥej, Hungario

Soveta Armeo — Liberiginto

Impresoj pri Ĉinio kaj UK en Pekino

Koreo — la lando de la matena freŝeco

19. **LALOV, Bojan** — Sofio, kv. „Ĉervena zvezda“, bl. 4, ap. 119.

Uzado de komputiloj en la instruado

Scienco kaj klerigado

Nuntempaj metodoj en esplorado de la cerbo

20. **MIĤALKOV, Georgi** — Sofio 1359,

kompl. „Ljulin“ — 5 mikrorajon, str. 510, bl. 508, vĥ. 2, et. 7, ap. 57, hejma tel. 25 79 27, ofica tel. 26 43 05.

Historio de la Esperanto-movado kaj literaturo

Historio de la bulgara Esperanto-movado kaj literaturo

21. **MLADENOV, Bojĉo** — 3000 Vraca, p. k. 66, tel. 092 — 4 78 51.

La rolo de la propagando por aktivigo de Esperanto-movado

La homo venkis la Kosmon

22. **MITEV, Venelin** — (ĉefredaktoro de gazeto „Paraleli“) — Sofio, bul. „Lenin“ 49, Bulgara Telegrafa Agentejo, ofica tel. 87 40 35, 84 61 (interna 323), hejma tel. 32 22 38.

La poezio de Zamenhof

La originala bulgara Esperanto-poezio

La renoviga proceso en Sovetunio

Sincere pri la nuntempa bulgara junularo

Aktualaj politikaj problemoj

Impresoj pri la vivo en nuntempa Francio

23. **MUTUŜEV, Dimităr** — 1408 Sofio, str. „Miĥail Bubotinov“ 32, tel. 51 03 14.

Kooperativa esperantista movado kaj ĝia organizaĵo

24. **NIKOLOV, Nikola** — 1113 Sofio, str. „Ĉapaev“ 2, vĥ. 3, tel. 71 62 17.

Internacia lingvo Esperanto (per koloraj bildoj)

Naciaj naturamikaj renkontiĝoj en Abaliget, Hungario (per koloraj diapozitivoj)

La turismo — efika vitamino por la Esperanto-movado

25. **OLJANOV, Violin** — 1404 Sofio, str. „Bojanski vodopad“, bl. 241, vĥ. E, tel. 58 89 33.

- „Fundamento de Esperanto” — solida bazo por evoluo de la lingvo
La Zamenhofa gramatiko — ĉu el nur 16 reguloj?
Lingvoevoluo kaj lingvaj disputoj
La fundamentoj de la lingvistiko
Reformemo — infana malsano de la esperantismo
La Esperanto-korespondanto — propagandisto de nia lingvo
(Kiel prezenti nian patrujon al eksterlandanoj)
Pri la konduto de la bulgara esperantisto en eksterlanda medio
26. **PILEV, Nikola** — 6300 Ĥaskovo, Oblasten Narodn Sâvet.
La kultura valoro de Esperanto
Kiel traduki poezion en Esperanto
Kiel propagandi Esperanton
27. **prof. POPOV, Kiril** — 1463 Sofio, str. „Dospat” 23, tel. 52 54 91.
D-ro L. L. Zamenhof — kreinto de Esperanto
UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) — agado kaj perspektivoj (Okaze de ĝia 80-jara jubileo)
Medicino — Esperanto — humanismo
28. **STOJĈEV, Stojĉo**, docento — 1404 Sofio, str. „Vasil Dimitrov”, bl. 244, vñ. A, tel 58 05 07.
La komputiloj kaj ties apliko
Programigo de komputiloj
La sistemo DLT por komputilaj tradukoj
29. **TRIFONĈOVSKI, Ljubomir** — 3000 Vraca, str. „Al. Stambolijski” 17, ap. 11, tel. 092 — 2 48 90, 2 10 83.
Problemoj de la Esperanto-kulturo
La Esperanto-teatro — stato, problemoj, perspektivoj
30. **UZUNOV, Nikola** — 6300 Ĥaskovo, kompl. „Trimata remsisti” 18/III, ap. 10.
Esperanto kaj nia nuntempo
Esperanto kaj la naciaj lingvoj
Esperanto kaj la scienc-teknika progreso
La Esperanto-instruado
La scienc-teknika progreso kaj la estonto de Esperanto
La internacia lingvo en la tekniko
La teknika terminologio en Esperanto
31. **VELKOV, Kiril** — 3000 Vraca, str. „David Todorov” 9, tel. 092 — 2 37 59.
La multlingveco en la scienco
Esperanto kaj ĝia rolo en la nuntempa mondo
Esperanto kaj komputiloj
La problemoj pri eksterteraj civilizacioj (kun diapozitivoj)
La planadoj de proksime (kun diapozitivoj)
Kosmaj esploroj — atingoj kaj perspektivoj (kun diapozitivoj)
Enigmoj de nia Tero
Nifoj — ĉu realaĵo? (kun diapozitivoj)
32. **VÂLEV, Kunĉo** — 1527 Sofio, str. „Ĉatalĝa” 5, tel. 44 34 51.
Lumo super la abismo de la multlingveco
D-ro L. L. Zamenhof — vivo, ideoj, agado
Esperanto kiel lingvo de poezio
La latinaj elementoj en Esperanto
Argumentoj defende al Esperanto
Historio de la bulgara Esperanto-movado kaj literaturo
Historio de la internacia Esperanto-movado kaj literaturo
La bulgara nacia kulturo tra la mondo per Esperanto
La instruado de Esperanto
Kiel naskiĝis kaj evoluis la lingvoj
Gramatikaj kaj lingvaj demandoj

Unua plenero en Gabrovo

Se iuj ŝercemuloj plu asertas, ke gabrovanoj estas malgastigemaj kaj avaraj mi povas diri la malon kaj doni al vi konvinkajn argumentojn.

Dum la Dua Esperantista Festivalo de Humuro kaj Satiro, okazinta en Gabrovo fine de majo j. k., ekestis la ideo restarigi la iaman foto-kinoklubon. Tion ni realigis dum amika vespermanĝo en la gastama domo de novelektita prezidanto de la

BEA, kaj Donĉo Ĥitrov, prezidanto de ILEF kaj de ties landa sekcio ĉe BEA.

Mirigitaj preterpasantoj observis la laboron de bunta grupo da diversaj viroj kaj virinoj kun fotoaparatoj, kinokameraoj, kun pupitroj enmane kaj kartonĉapeletoj surkape, kiuj tutan tagon vagis tra Gabrovo — fotantaj, filmantaj, pentrantaj multnombrajn arkitekturaĵn, histo-

tin Atanasov el Gabrovo prezentis fragmentojn el sia filmo „La naŭ ĉefurboj de Ĉinio”, filmita dum lia restado en kadre de la UK de Esperanto en 1986.

Frumatene dimanĉe ni forveturis aŭtobuse al la Arkitektura Rezervejo „Etăr” — je 15 km de Gabrovo. Multaj el miaj gekolegoj estis vere embarasitaj kion foti, filmi aŭ elekti kiel pentrartan objekton en tiu perlo de nia tipe bulgara malnova vilaĝa arkitekturo. Niaj impresoj kaj emocioj atingis kulminon pro tute neatendita evento: folkloro danc- kaj kantgrupo en popolaj kostumoj prezentis por la vizitantoj klasikan malnovbulgaran edziĝceremonion. Tio estis vera donaco por ni ĉiuj kaj mi jam ne kalkulis kiom da filmskatoloj mi eluzis por fiksi tiun okazaĵon!.. Sed atendis nin nova surprizo: ĉe la enirejo en la arkitektura rezervejo sur la larĝa fenestro de forĝejo-laboro por metalproduktaĵoj ni tralegis ŝildon „ESPERANTO PAROLATA” kaj ene bonmiene ridetis al ni la esperantisto-veterano Danail Ivanov el vilaĝo Aprilovo, majstro de tranĉiloj, sabroj, plugiloj ktp!... Agrabla amika renkontiĝo, babilado en Esperanto kaj fine — regalo en la kafejo per „blank-kolora konfitaĵo” kaj aroma kafo.



Donĉo Ĥitrov bonvenigas la partoprenantojn.

Foto: Kiril KALĈEV

klubo „Fokuso” Kosjo Ilev. Lia okjara filineto Ĥristina estas jam esperantistino kaj partoprenis en la programo de la humura festivalo. Ambiciaj gabrovanoj mem proponis, ke la Unua Plenero (subĉiela fotado kaj pentrado) de Esperantistoj-Filmagantoj kaj Pentristoj okazu en Gabrovo de la 24-a ĝis la 25-a de junio j. k. La iniciatema kaj energia prezidantino de societo „Verda torĉo” Maria Avramova kredigis min, ke ili disponigos favorajn labor- kaj vivkondiĉojn al la partoprenantoj.

Kaj tio realiĝis. Per korvarmaj salutvortoj Maria Avramova bonvenigis la partoprenantojn. Kore salutis la ĉeestantojn kaj bondeziris al ili sukcesan laboron Ivan Ĉulev, reprezentanto de la Centra Estraro de

riajn kaj kulturajn vidindaĵojn kaj monumentojn. Multaj scivolemuloj alparolis niajn gekolegojn, interesiĝis pri ilia laboro, pri la aranĝo kaj pri Esperanto, traleginte sur iliaj ĉapetoj la surskribon „ESPERANTO — LINGVO INTERNACIA”.

Gajan amikan etoson ni ĝuis dum la interkona vespero, okazinta en kino-videoklubejo „Eksperimento”. La renkontiĝo kun gabrovaj esperantistoj kaj kulturagantoj el la urbo transformiĝis en burleskan karnavalon — kun maskitoj, dancoj kaj kantoj!... Estis prezentita la filmo

„Esperanto — jarcento unua” de la pola reĝisoro Roman Dołżyński laŭ scenaro de Donĉo Ĥitrov, kiu konigis la ĉeestantojn pri la historio de ĝia preparo. La pentristo Valen-

Viciĝintaj en unu linio antaŭ la altega panelo kun ceramikaj figuroj kaj objektoj ĉe la enirejo de la rezervejo, la partoprenantoj en la Plenero estis distingitaj per specialaj atestiloj kaj memorinsignoj, kiujn enmanigis Donĉo Ĥitrov en la nomo de la organizantoj.

Kaj denove ni estis survoje — al monaĥejo Sokolski kaj alia arkitektura rezervejo — vilaĝo Bojenci, la lastaj objektoj de nia interesa riĉa programo.

Porinforme: ekde nun la sekcio de filmagantoj kaj pentristoj ĉe BEA sin preparas por la sekvanta subĉiela aranĝo ie en nia belega patrujo kaj por partopreno en la Tria ILEF-festivalo (plej verŝajne en Pollando — en 1990) kaj speciale en la Tria Esperantista Festivalo de Humuro kaj Satiro en Gabrovo en 1991 — kun internacia partopreno.

Venu, amikoj, kaj agu kun ni!

Radi BANĈEVSKI

ĈIRKAŬ LA FAMILIA PINO

Tiuj, kiuj jam vizitis Internacian Esperanto-Kursejon en Pisanica, bone konas la ĉarmon, la kvietan varmecon kaj gastamon de Rodopi-montaro, kie naskiĝis Orfeo kaj la legendo pri lia fabela muziko. Eble lia muzikemo originas de la pitoreska naturo de tieaj lokoj. Tiun senton al la kanto portas en siaj koroj ankaŭ hodiaŭaj loĝantoj de Orfea montaro.



Ekkresku nova familia pino.

La popolaj kantoj kaj dancoj akompanas ilin dum momentoj de feliĉo kaj tristo. Per popolmuziko iliaj praavoj gardis sian naciecon dum kvinjarcenta otomana jugo.

Por kanti elkore, por vidi unu la alian, ĉiujare sur granda freŝa herbejo apud la vilaĝoj Ŝiroka Lâka kaj Gela kunvenas parencoj. Ili ĉiam kolektiĝas en la Tago de Sankta Elija (Ilinden) por rememori la heroaĵon de la pereintaj por liberigo elsub otomana jugo dum la Ribelo en 1903 (nomata bulgarlingve Ilindensko-Preobraĵensko Vâstanie).

Tiu memortago estas ankaŭ okazo por renkontiĝo de parencoj el diversaj tieaj familioj. Ĉiu familio havas sian pinon, sub kies ombro oni aranĝas manĝotablon. Ĉiuj, kiuj vizitis tiun vilaĝfeston, konas la Karovpinon aŭ Boĉukov-pinon, aŭ...

Ĉi-jare la ombro sub la Balabanov-pino ne sufiĉis por ĉiuj parencoj de tiu granda familio.

Post 20 jaroj de konstanta kaj fervora esplorado, Vasil Kapuŝev — teknikisto el urbo Smoljan, sukcesis kunvenigi la plimulton de tiu 300-jara familio.

Hodiaŭ la nombro de Balabanov-familianoj estas proksimume 6000. Ili loĝas en 50 urboj kaj 30 vilaĝoj bulgaraj. Iuj loĝas ankaŭ en USSR, Ĉeĥoslovakio, GDR, FRG, Italio, eĉ en Aŭstralio.

Riĉenhava fotoekspozicio kaj tabuloj, montrantaj la disbranĉiĝon de la familia arbo, rakontas pri ĝia historio. Malfacila kaj malfeliĉa estis ĝi en la pasinteco, kiam la jatagano de subigantoj dispartigis ĝin laŭ religio...



La malnovaj fotoj „parolas”...

Vasil Kapuŝev rakontas pri la historio de Balabanov-anoj.

Eksonis rodopaj sakflutoj
Fotoj: Slavej EJKOV

... Estis dum la jugo. La subigantoj strebis ĉiumaniere asimili la bulgarojn: per sklavigo de tutaj familioj sendataj malproksimen de Bulgario; per perforta islamano; per t. n. „sanga imposto” — forkonduko de bulgaraj knaboj, kiuj post eduko en speciala lernejo iĝis janiĉaroj — la plej kruelaj soldatoj en la imperia armeo, kiuj senkompe murdis siajn gepatrojn, gefratojn... Antaŭ 300 jaroj, kiam la tempesto de amasa islamano en Rodopi-montaro trafis la tiaman vilaĝon Balaban (hodiaŭ Jagodina), du fratoj devis decidi pri sia sorto. Unu el ili akceptis la islamon, kaj la alia konservis sian kristanan religion, fuĝante kun sia tuta familio kaj ekloĝante en la regiono de Ŝiroka Lâka. Tiumaniere kreskis la du gravaj branĉoj de la granda Balabanov-familio.

Dum jarcentoj la parencaj ligoj dormetis en forgeso.

Proksimume antaŭ nur 100 jaroj, kiam oni konstruis la kazernon en urbo Devin, Todor K. Balabanov el Ŝiroka Lâka kaj unu jagodano, konata per sia kromnomo Me-

darja, hazarde komprenis, ke ili fakte estas kuzoj. Kelkfoje Medarja gastigis Todor kiel plej karan gaston. De tiam oni komencis demetadi la vualon de la forgeso, por ke venu la ĉi-jara tago de familia kunveno.

Inter la partoprenantoj ĉeestis multe da parencoj el Jagodina. En ilia nomo Asja Ŝalakova — unu el la junaj reprezentantinoj de la familio Balabanov, diris:

— Ni tre ĝojas, ke ni venis ĉi tien, invititaj sincere kaj elkore. Estu tiel por ĉiam. Nin nenio disigas: la sama estas nia origino, similaj estis niaj malfeliĉaj sortoj en la pasinteco, kune ni batalis por paŭzo, kaj hodiaŭ estas komunaj niaj impetoj, ĝojoj kaj doloroj.

Ĉarma estis tiu aŭgusta tago, kaj mi ne certas, ke ĝi sufiĉas al la Balabanov-familianoj por ĝissate babiladi, rondodanci kaj aŭskulti sakfluton. (Estis aŭtoj eĉ el la malproksimaj nordaj regionoj de la lando). Sed mi certas, ke ĉiuj atendos senpacience la venontan parencarkunvenon.

M. TODOROVA



Kupraĵistoj el Ustovo

Kiel eterna legendo restis la tempoj, kiam en la komerca-metiista parto de Ustovo tintis centoj forĝistaj marteioj. Hodiaŭ en ĝia plej granda metiista centro de Mezaj Rodopi-montaro restis nur kelkaj majstroj. La esploranto de tiu ĉi regiono Anastas Primovski skribas, ke en la jaro 1948 en Ustovo ankoraŭ laboras 112 kupraĵistoj kaj stanistoj. Sed la „ora“ tempo de rodopa kupraĵista metio estis Bulgara Renesanco. Bakpladoj, akvoĉerpiloj, kaldronoj, pelvojoj ekbrilis en ĉiu rodopa domo. Iam la mastroj-metiistoj gravuris arte la metalon, transigis al ĝi sian strebon al harmonio.

La kupraĵoj estis serĉataj malproksime de tiu regiono. Karavanoj ŝarĝitaj per kupraĵellaboraĵoj atingis la urbe-tojn en Norda Grekio kaj ankaŭ insulojn Thassos kaj Samothraki. Oni sukcese vendis la metiistajn produktojn el Ustovo dum fama Uzunĝova foiro, kiu altiris komercistojn el multaj landoj.

En la XIX jarcento, ĉe la otomana regado, la ustova kupraĵista gildo aktive batalis por sendependa bulgara eklezio kaj klerigo. Laŭ iniciato de ties ĉefo Sevasto Stratev estis konstruita en la jaro 1865 la plej granda ĝis

nun preĝejo en Ustovo — „Uspenie Bogorodiĉno“.

Vizitante nuntempajn metiejojn en Ustovo, mi pense sekvas ties pasintecon. La metiejoj estas proksime unu al alia en la centro. Multaj kupraĵistoj lernis kaj laboris en la metiejo de la famaj fratoj Andreev, kiuj jam mortis. Pri la majstreco kaj arto de fratoj Andreev oni aldonis antaŭnelonge specialan albumon.

Mia unua kunparolanto Nikola Piŝianov rememoras al si, ke fratoj Andreev estis inter la fondintoj de la nacia organizo de artaj metioj. Jam pensiulo, Piŝinov daŭrigas sian membrecon en tiu ĉi organizo kaj plenumas ties taskojn. Dum li ĉirkaŭforĝis kupraĵon, mi demandis lin, kiaokaze estas farita la granda foto sur la muro.

— Ĉu tiu? — sen haltigi la laboron daŭrigas la majstro. — Ĉe mi gastis specialistoj el Meksiko, kiuj prenis miajn ellaboraĵojn por ekspozicio en sia lando kaj sendis al mi la fotografion. Miaj eksponaĵoj estas ankaŭ en Italio kaj aliaj landoj.

Kliniĝinta super sia laboraĵo mi trovis ankaŭ Nikola Spiridonov. Sesdek jarojn li okupiĝas pri kupraĵista metio. Kiel multaj siaj kolegoj li samtempe prilaboras kupra-

ĵojn kaj stanaĵojn. Li estas zorgoplena pri la fakto, ke multaj junaj homoj fordonas sin al tiu tipa bulgara metio.

Elirante el la metiejo de Spiridonov mi ĵetis rigardon al fronta deklivo. Laŭ krutaĵoj blankas novaj domoj. En unu el ili atendas min Taŝo Miĥajlov, la plej juna majstro en Ustovo. En lia domo ĉio estas nova kaj bone aranĝita. Mi tuj admiras belegan ekspozicion el kupraĵoj, inkluzivantan eksponaĵojn el Rodopi-montaro. Ĉiujn ilin ellaboris la lertaj manoj de Taŝo. Li regule partoprenas naciajn revuojn pri amatorarto. Multaj homoj admiras liajn eksponaĵojn en Konstanta Ekspozicio de Popolaj Metiaĵoj en vilaĝo Oreŝak. Dum la Kvina Revuo de Amatora Arto Taŝo Miĥajlov estis distingita per ora medalo.

La plej granda forto en la kupraĵista arto estas lia serĉado de sia propra maniero, vidpunkto pri proporcioj kaj ampleksoj. Kun reliefo kaj ekstera gravurado Taŝo Miĥajlov atingas la plej bonajn tradiciojn de la rodopa kupraĵista skolo. Ne sen fiero oni parolas pri Taŝo Miĥajlov: „Naskiĝis majstraj manoj“.

Atanas ILKOV

Sur la foto: Laboras Taŝo Miĥajlov.

Foto: Asen EJKOV

Al-mia demando, ĉu ŝi vidas konkretajn bildojn, vizaĝojn, cirkonstancojn, ŝi respondis: Jes.

En kiu tempo: pasinteco, nuntempo, estonteco? Ŝi respondis pri la tri periodoj: Jes, egale.

— Ĉu la vizio estas skemeca, nur kiel informo pri la persono, aŭ ĝi estas konkreta? Respondo: Kaj skemeca, kaj konkreta.

— Ĉu ĉiu homo havas propran kodon, per kiu oni distingas la fadenon de lia sorto? — Ŝi ne respondis.

— Kiel montriĝas la sorto de iu homo ĉe ŝiaj seancoj: ĉu reliefigas nur gravaj eventoj, aŭ ŝi vidas la tutan vivon kvazaŭ sur filmbendo? — Ŝi vidas la vivon kvazaŭ sur filmbendo.

— Ĉu ŝi „legas“ pensojn? — Jes.

— Je kia distanco? — Tutegale.

— Ĉu ŝi „legas“ pensojn de eksterlandanoj, kaj kian formon havas la informoj? — Jes. Kutime ŝi aŭdas voĉon, kaj ne estas lingvaj barieroj.

— Ĉi ŝi povas „mendi“ informojn pri konkreta periodo aŭ responde al iu demando? — Jes.

— Ĉu ĉe aŭskultado de radio iu informo povas provoki ĉe ŝi bildon? — Ne. Ŝi malofte aŭskultas radion.

— Ĉu la forto de ŝiaj aŭguraj kapabloj dependas de la seriozeco de la problemo aŭ de la mensa, psika forto de la persono, kun kiu ŝi parolas? — Jes.

— Ĉu tio dependas ankaŭ de la momenta san- kaj animstato de la persono? — Ne.

— Ĉu, se ŝi aŭguras ian malfeliĉon aŭ eĉ ies morton, la koncerna homo povas preventi ĝin? — Ne, tion povas nek Vanga, nek la persono.

— Kaj se temas pri aro da homoj, pri loĝloko aŭ ŝtato? — Ne.

— Ĉu la vivo de la homo dependas de la „volo de la individuo“, kaj ĉu oni povas aliigi ĝin? — Ne, ĉiu sekvas strikte destinitan vojon.

LA FENOMENO

Krasimira STOJANOVA

Ni, ŝiaj nevoj, la idoj de ŝia fratino, kreskis apud ŝi kaj estante infanoj ni konsideris ŝian strangan konduton kaj ŝiajn agojn tute naturaj. Nur foj-foje ni ne povis kompreni, kial nia onklino paliĝis, kial ŝi subite eksvenis kaj neatendite el ŝia buŝo eliĝis voĉo, kiu impresis nin per sia fortoco, per vortoj kaj frazoj, kiujn ŝi kutime ne uzis. Tiam la adoltoj apud ŝi aŭskultis preskaŭ senpire, kaj poste iu diris, ke ŝi parolas pri signifaj eventoj, kiuj okazos al la homoj post multaj jaroj.

Mi estis 16-jaraĝa, kiam foje Vanga alparolis min en nia domo en Petriĉ. Sed tio ne estis ŝia voĉo, eĉ tio estis ne ŝi mem, sed ia „alia“ homo, kiu parolis per ŝia buŝo. La vortoj, kiujn mi aŭdis, tute ne rilatis al nia antaŭa interparolo — kvazaŭ alia persono intermiksiĝis. Mi aŭdis: „Jen, ni vidas vin...“, kaj poste sekvis detala priskribo de ĉio, kion mi faris ĉi-tage. Mi preskaŭ stoniĝis pro timo. En la domo estis nur ni ambaŭ. Post mallonga tempo Vanga ekspiris kaj diris: „Ho, la fortoj lasis min, kaj ŝi denove daŭrigis la antaŭan interparolon. Mi demandis ŝin, kial ŝi tiel subite priskribis, kion mi faris dum ĉi tiu tago, kaj ŝi respondis, ke ŝi nenion estus priskribinta. Mi rakontis, kion

— Kial ŝi ekscias, kio estas la ĉefa problemo de la vizitantoj? — Aperas „bildo“ kaj aŭdiĝas „voĉo“.

— Ĉu ŝi pensas, ke ŝiaj aŭguraj kapabloj estas programitaj de pli superaj fortoj? — Jes.

— De kiaj? — Ŝi ne respondis.

— Kiel ŝi perceptas ilin! — Plej ofte kiel „voĉon“.

— Ĉu ŝi iam vidis ilin? — Jes. Estas tra-

„Ĉiu honesta provo enpenetri la estontecon certe interesos multajn, sed la homojn jam tudas la scienca vanteco. Do, ni ne tro klarigu, ni simple rakontu...”

John Windom

mi aŭdis, kaj ŝi ripetis: „Ho, tio estas la „fortoj”, la etaj „fortoj”, kiuj ĉiam estas ĉirkaŭ mi. Sed ekzistas ankaŭ grandaj „fortoj”, ili estas la ĉefoj. Kiam ili ekdeziras paroli per mia buŝo, mi eksvenas kaj poste mi estas malvigla dum la tuta tago. Cetere, ĉu vi volas vidi ilin? Ili deziras montriĝi al vi.” Mi estis tiel ŝokita, ke mi vere ekkriis, ke mi ne volas. Sed poste mi iomete trankviliĝis, la scivolemo venkis, kaj mi demandis, kion mi vidus:

— Nu, en la aero vi vidos lumantajn punktetojn, kiuj similas al lampiroj — diris Vanga.

Estis aŭtuno, ĉirkaŭ tagmezo.

Poste, dum la jaroj, mi mem klopodis trovi klarigon por tiu fenomeno. En diversaj periodoj, kiam Vanga estis en bona humoro, mi starigis al ŝi diversajn demandojn, al plejparto de kiuj ŝi respondis. Feliĉe mi konservis tiujn notojn. Kiam mi kolektis ilin, rezultigis siaspeca enketo, kiu kreas ĝeneralan imagon pri la kapabloj de Vanga.

videblaj figuroj — similaj al respegulo de homo en akvo.

— Ĉu la lumantaj punktetoj en la aero estas ilia manifestiĝo? — Jes.

— Ĉu ili povas materialigi? — Ne.

— Laŭ kies volo — ĉu laŭ ilia aŭ de Vanga — ekestas la kontaktoj? — Kutime laŭ ilia.

— Ĉu ŝi per demandoj povas ekscii ion pli precizan pri ili? — Ne. Malfacile. Ili respondas tro nebule.

— Ĉu la kontaktoj estas unuflankaj, t. e. laŭ ilia deziro? — Plej ofte jes.

— Ĉu la homo konsistas el kelkaj interligitaj „korpoj”: anima, mensa kaj fizika? — Jes.

— Kiel ŝi vidas la mortintojn — kiel bildon, nocion aŭ ion alian? — Ŝi vidas „bildon” kaj aŭdas „voĉon”.

— Ĉe kontaktoj kun mortintoj, ĉu ankaŭ ili montras intereson, aŭ ili nur respondas al demandoj? — Ili kaj respondas, kaj mem demandas.

— Ĉu la personeco konserviĝas post la morto? — Jes.

— Kio estas laŭ ŝi la morto? — Nur fino de la fizika korpo.

— Ĉu ekzistas reenkarniĝo? — Ŝi ne respondis.

— Kio estas pli forta — la parenca aŭ la spirita ligiteco? — Pli forta estas la spirita ligiteco.

— Ĉu ekzistas unuiĝoj de pli altranga racio? — Jes.

— Se oni konsiderus la homojn speco de organizita racio sur certa ŝtupo de la evoluo, ĉu ekzistas alia, paralele pli supera racio? — Jes.

— De kie originas tiu pli supera racio — de la Kosmo, de malnovaj teraj civilizacioj aŭ de la estonteco de la Tero? — De la Kosmo.

— Ĉu sur la Tero ekzistis grandaj civilizacioj antaŭ la nia? — Jes.

— Kiom da? — Ŝi ne respondis.

— Ĉu oni povus konsideri la homan civilizacion infanaĝo de la racio? — Jes.

— Ĉu en la Universo ekzistas samnivela al la nia civilizacio? — Ŝi ne respondis.

— Ĉu en la tera atmosfero ekzistas „flugantaj teleroj”? — Jes.

— De kie ili venas? — De planedo, kiu laŭ ili nomiĝas Vamfim, aŭ almenaŭ ŝi tiel aŭdas la nomon. Ĝi estas la tria rilate al la Tero. (Ŝi nenion pli klarigis.)

— Ĉu jam estas realigita duflanka (telepatia aŭ alia) kontakto kun ili? — Ne. Nur ili mem estigas la kontaktojn.

(Daŭrigota en n-ro 11/89)

Dum ISEU oni ne enuas



Solena malfermo per E-himno.

Foto: Veneta BALEVA

De la 15-a ĝis la 21-a de julio j. k. Veliko Târnovo por la sepa fojo bonvenigis la partoprenantojn en la Internacia Somera Esperanto-Universitato, organizata de BEA, E-societo „Lumo” — Veliko Târnovo kaj la loka Universitato „Kiril kaj Metodij”.

La 16-an de julio Kunĉo Valev, multjara gvidanto de ISEU, oficiale malfermis la ĉi-jaran sesion. Sava Dâlbokov — prezidanto de BEA, Ivan Dimitrov — urbestro, kaj docento Nenĉo Bonev — reprezentanto de la universitata estraro, salutis la ĉeestantojn, kiuj ĉijare estis pli ol 120 personoj. Inter ili estis gastoj el Hispanio, Japanio, Nederlando, Nov-Zelando, Pollando.

Prelegoj: Sume 20 prelegoj de 8 lektoroj pritraktis diversajn temojn.

La ĉefredaktoro de revuo „Esperanto” de UEA — Mark Fettes — provokis grandan intereson per prelegoj pri gravaj momentoj en la evoluo de la internacia E-movado kaj de UEA.

Pri similaj problemoj parolis ankaŭ Kunĉo Vâlev, kiu ankaŭ emfazis iujn lingvajn karakterizaĵojn de Esperanto.

Doktoro Nikola Donev prelegis pri ĝenerale interesaj medicinaj problemoj.

Ankaŭ profesoro Kiril Popov parolis pri medicino, sed, krome, pri ekologio kaj pri la personeco de L. L. Zamenhof.

Donĉo Hitrov prezentis faktojn pri la bulgara-hungara kunlaboro en la kinoarto kaj ideojn pri la E-propagando.

La prelegoj de Ljubomir Trifonĉovski koncernis la piramidan modelon de la E-socio kaj la E-teatron.

Pro foresto de Spomenka Ŝtimec mi rakontis el propra sperto pri la Zagreba instrumentado.

Interesaj estis la prelegoj de Kiril Velkov pri astronomio, kosmaj flugoj kaj neidentigitaj flugantaj objektoj.

Pro foresto de iuj lektoroj ne ĉio el la anticipe anoncita programo realiĝis. Tamen la organizantoj sukcesis rearanĝi la programon kaj anstataŭigi la forestantojn.

Nepre menciinda estas la aktiveco de la publiko, kiu demandis, aldonis kaj pensigis.

Kultura programo: Dum tiu semajno ni povis ekskursi al diversaj vidindaĵoj en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. En Veliko Târnovo estas ege interesaj malnovaj fortikaĵoj kaj muzeoj. En renesanca domo (t. n. Sarafkinata kâŝta) ni ĝuis koncerton de la urba koruso pri malnovaj kanzonoj.

En la muzeo de la konata bulgara verkisto Emilian Stanev ne mankis informoj kaj lumbildoj pri la E-versio de lia romano „Ŝtelisto de persikoj”.

La ekskurso al la antikva ceramika centro kaj al la ruinoj de la iama romia urbo Nikopolis ad Istrum pliriĉigis la konojn pri la historio de tiu regiono.

En la vesperaj koncertoj partoprenis artistoj el Veliko Târnovo kaj gastoj-esperantistoj.

Prezidanto de BEA Sava Dâlbokov enmanigas la jubilean medalon „100 jarojn Esperanto” al la redaktoro de revuo „Esperanto” Mark Fettes.

Foto: Hristo METEV

Ne eblas mencii ĉion, kio meritis atenton dum ISEU. Sed mi nepre deziras rekomendi al ĉiuj kiuj ankoraŭ ne estis en Veliko Târnovo, ke ili nepre vizitu ĝin kaj ĝuu la imponajn spektaklojn „Suno — Lumo” kies majesta scenejo estas la monteto Carevec.

Publika intereso: Ĝojiga estis la intereso pri ISEU flanke de lokaj kaj centraj amas-komunikiloj: Bulgara Televido, Bulgara Radio, Agentejo „Sofia Press”. Okazis ankaŭ renkontiĝo inter reprezentantoj de la loka ĵurnalo „Borba” („Batalo”) kaj partoprenantoj en ISEU.

Konklude: Ĝenerale la sepa sesio de ISEU plaĉis al mi — kaj ne nur al mi. Sed la partoprenantoj esprimis ankaŭ iujn rekomendojn, kiujn indas konsideri estonte:

- **La tempo, dum kiu okazas ISEU, ne estas tre konvena, ĉar preskaŭ samtempe estas organizataj la Universala kaj la Junulara Kongresoj. Tio malhelpas multajn interesiĝantojn kaj eventualajn prelegantojn veni al ISEU.**

- **Ĉi-jare la programo estis iom streĉa. Se oni aŭskultas antaŭtagmeze kvar prelegojn, restas malmulte da tempo kaj energio por pridiskuti ili detale. La organizantoj jam konstatis tion kaj pripensas la eblecon redukti la nombron de la prelegoj kaj pli precize grupigi ilin laŭ la temoj.**

- **La partoprenantoj estis loĝigitaj en studenta komunumloĝejo, en unulitaj ĉambroj. La loĝkondiĉoj estis multe pli bonaj ol dum pasintaj jaroj. Tamen iuj partoprenantoj preferus hotelon. Do, oni pripensu, ĉu eblus oferti kaj malmultekostajn komunumloĝejajn, kaj hotelajn ĉambrojn al la gastoj de ISEU.**



- **Sentiĝis la bezono pri salono, en kiu oni povus kolektiĝi kaj amuziĝi ĉiuvespere.**

- **Ĉi-jare dum ISEU vendiĝis E-libroj kaj esperantaĵoj dank'al la iniciatemo de samideanoj el Stara Zagora. La intereso al ilia stando estis grandega. Sekve, ankaŭ estonte oni nepre aranĝu librostandojn.**

Dum la ĝisnunaj sesioj la organizantoj spertiĝis kaj ekhavis novajn ideojn. ISEU promesas esti vere altnivela universitata E-aranĝo. Oni jam komencis la organizadon de la venontjara oka sesio de ISEU. Sukceson!

Mariana EVLOGIEVA

TURISMO SERVE AL ESPERANTO

Jam kvar foje en Sofio estas organizataj Turismaj Esperanto-Tagoj (TET). Ĉi-jare ili okazis de la 9-a ĝis la 11-a de junio.

LA INTERKONA VESPERO

Vespere en la plenplenan klubejon de la Centra Esperanto-Kulturdomo senĉese invadis homoj por partopreni la interkonan vesperon. Venis geesperantistoj el 19 loĝlokoj de Bulgario kaj grupo el Jugoslavio. La partoprenantojn salutis Nikola Nikolov de la Organiza Komitato kaj en la nomo de la gastoj el Jugoslavio salutparolis Stojan Kocovski, estrarano de Jugoslavia Esperanto-Ligo.

La belarta programo komenciĝis en la granda salono per kantado de la Soria E-Horo. Estas granda ĝuo aŭskultadi tiun kvindekmembran Ĥoron sub la gvido de Katja Vučkova. Sekvis plenumoj de kantoj, versaĵoj, skeĉoj kaj dancoj de grupoj kaj kolektivoj el tuta Bulgario kaj de individuaj profesiaj artistoj. Ĉarmis la publikon la elpaŝoj de junaj talentuloj el Jambol, Razgrad, Jablanica kaj Botevgrad. Tre originalan, varian kaj bonhumoran programon ludis la sofia kant-grupo „Verda Fiakro”.

Ni devas aparte mencii la agrablajn sinprezentadojn de nia konata poetino Penka Papazova, artistino Ana Ivkova kaj opera kantisto Todor Atanasov. Forte estis aplaŭ-

kuradkonkurso sub la aŭspicio de revuo „Bulgara Esperantisto”. Malgraŭ la ekpluvo preskaŭ ĉiuj insistis kaj trakuris la itineron longa 1,500 m. Jen la klasigo: viroj — 1. Konstantin Kostov, 2. Ĥristo Borisov; virinoj — 1. Septemvrina Kostova, 2. Nadja Marĉeva, 3. Asja Donĉeva; infanoj — 1. Angel Marĉev, 2. Ira Emilova kaj 3. Ivajlo Aleksiev. Ĉiuj partoprenantoj pro ilia persisto kaj fervoro estis premii-taj. Dum TET oni disdonis al neesperantistoj 800 flugfoliojn pri Esperanto kaj 500 kartonajn varbajn ĉapelojn. Ilin disponigis BEA.

De la komenco ĝis la fino de la arango konstante deĵoris kaj vendadis diversspecajn esperantaĵojn nia aktivulo Lasto Nikov.



Neesperantistoj ĉe montodomo „Esperanto” salutas per turistaj kantoj.

Poste oni spektis la videofilmon „Esperanto”, pretigita okaze de la centjariĝo de la lingvo. Intertempe daŭris la alveno de novaj kaj novaj grupoj el la provinco. La junulara kantensemblo el Jambol, gvidata de Liljana Paraŝkevova, okupis la scenejon kaj komencis gaje kanti kaj muziki. Sekvis plenumoj de junaj esperantistoj el Sofio kun gvidantino Jordanka Sâbeva.

Malfrue vespere la ĉeestantoj disiĝis por denove kolektiĝi la sekvan tagon.

ĈE LA LAGO DE PANĈAREVO

Feste ornamita estis kulturdomo „Videlina” de pitoreska apudmontara kvartalo Panĉarevo. En la antaŭsalono oni povis trarigardi ekspozicion de Neli Abaĝieva „Kun Esperanto tra la mondo” kaj ekspozicion „La naturo tra la infanaj okuloj”.

ditaj sofiaj kantistinoj de malnovaj urbaj kantoj.

Posttagmeze la ŝipeto sur la lago trifoje krozadis plenplena de turistoj-esperantistoj.

ĈE MONTODOMO „ESPERANTO”

Malgraŭ la malfavora vetero dimanĉe ĉe montodomo „Esperanto” kolektiĝis multe da esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Pri Esperanto parolis nia verkisto Georgi Miĥalkov. La plej bonaj ensembloj, kiuj kantis kaj ludis en Panĉarevo denove aperis sur la scenejo. Novaj grupoj kaj unuopaj artistoj, kiuj ĵus venis el la provinco ankaŭ sin prezentis. Tre entuziasme per kantoj, muziko kaj versoj salutis neesperantista grupo. Sekvis popoldancoj, kiujn partoprenis ĉiuj ĉeestantoj.

Oni devas mencii la partoprenon de kvindeko da personoj en la dua



Jambola junulara kantensemblo sub la gvido de Liljana Paraŝkevova kantas.

Dudekmembra organiza komitato multe laboris por bone prepari tiun amasan kaj varian aranĝon. 200 afiŝoj kaj 1000 programoj estis senditaj al societoj kaj kluboj tra Bulgario. Informoj pri TET antaŭ ilia okazigo aperis en tag-ĵurnaloj „Rabotniĉesko delo”, „Oteĉestven front”, „Veĉerni novini” kaj semajna ĵurnalo „Eĥo”, kiuj havas eldonkvanton ĉirkaŭ 1 200 000 da ekzempleroj. Aperis sciigoj ankaŭ pere de la tutlandaj radio kaj televido.

La estraro de Turisma Sekcio ĉe BEA esprimis grandan dankon al la Organiza Komitato, al la societoj kaj kluboj, kiuj helpis la partoprenon de siaj artkolektivoj, al la multnombraj artistoj, kiuj aperis sur la scenejoj kaj al ĉiuj, kiuj partoprenis la 4-ajn Turismajn Esperanto-Tagojn en Sofio.

Stefka ĈENKOVA
Veneta BALEVA

EN LA BUROO DE CE DE BEA

En sia kunsido la 28-an de junio k. j. la Buroo de CE de BEA pridiskutis raporton de Komisiono pri Organiza Agado ĉe BEA. Oni konstatis, ke la Komisiono post ĉi-jara Februara Plenkunsido de CE de BEA regule okazigis kunsidojn, dum kiuj oni traktis kaj decidis gravajn demandojn de la organiza laboro. Tuj post la Plenkunsido komencis labori asociaj organizantoj, respondecantaj pri E-laboro en departementoj. Oni vizitis multnombrajn societojn kaj donis metodikan helpon surloke. Estis turnita speciala atento al la fakto, ke ne ĉiuj membroj de la Komisiono aktive agadis. Iuj el ili pro personaj kaŭzoj ne povis partopreni en la laboro.

Oni emfazis la meriton de la Komisiono pri la bona organizado de la seminarioj por trejnado de aktivuloj kaj etatoficistoj. La seminarioj ludis rolon de forumo por informado, diskutado kaj akcepto de rekomendoj rilate plibonigon de la laboro. Kiel nekontentiga estis pritaksita la kunordigo de la agado de asociaj sekcioj. Multaj el ili ekzistas nur surpapere, aliaj havas klubojn ĉe la societoj aŭ nombras malmultajn membrojn. Oni komisiis al la estraro de la Organiza Komisiono kaj al prof. Kiril Popov — respondeculo pri la agado de la sekcioj ĉe la Buroo, renkontiĝi kun la sekciaj estraroj, informiĝi pri ilia stato kaj proponi al la Buroo koncernajn decidojn tiudirekte. Entute la Buroo pritaksis kiel tre bona la ĝisnunan laboron de la Komisiono pri Organiza Agado kaj donis instrukciojn pri praktika laboro rilate la plenumon de la kompleksa programo, akceptita fare de la Februara Plenkunsido.

En la sama kunsido estis pridiskutita la informo pri la organizado de la nova lernojararo. La Komisiono pri Instruagado ĉe BEA kreis memstare aŭ kun aliaj laborgrupoj bonajn kondiĉojn por la antaŭstarantaj naciaj kursoj en 1989/90. Kiel malperfektaĵo estis notita la nesufiĉa atento al la organizado de la kurslaboro dum la nova lernojararo en la societoj. Ĉi tiu demando oni pridiskutis en la Nacia Konferenco de la Instruantoj pri Esperanto, okazinta en junio k. j. Dum ĝi oni planis seriozajn paŝojn pri solvo de la problemoj. Pro la graveco de la instrulaboro, la Buroo decidis, ke tiu demando estu traktata aŭtune, en la antaŭvespero de la nova lernojararo. Al la Komisiono pri Instruagado kaj ankaŭ al aliaj komisionoj oni rekomendis uzi plenvalore la asociajn organizantojn en la departementoj kiel respondeculojn pri la kompleta E-agado sur la koncerna teritorio.

La Buroo preparolis ankaŭ iujn aktualajn demandojn pri la bona organizo de vico de internaciaj aranĝoj en nia lando.

Estis aprobita plano de BEA pri eldonado de priesperantaj propagandaĵoj.

La Buroo de CE de BEA traktis ankaŭ iujn financa-administrajn problemojn.

Dimităr PAPAZOV,
ĝenerala sektretario de BEA

LINGVO DE SCIENCA KOMUNIKADO

La 19-an de junio 1989 en salono de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto kunvenis membroj de la Unuiĝo de la Sciencistoj, Bulgara Astronaŭtika Societo, Unuiĝo de la Medicinaj Societoj, lingvistoj, matematikistoj, fizikistoj, filozofoj, ekonomikistoj, inĝenieroj, agrikulturistoj, ekologoj. Inter ili estis la ĉefredaktoro de la E-eldono de revuo „Scienca mondo“ prof. Vasil Peevski, Violin Oljanov, la membroj de Internacia Scienca Akademio prof. Kiril Popov, prof. Ĥr. Marinov.

La kunveno estis malfermita de Sava Dălbokov — prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio kaj vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, kaj poste estis gvidata de Dimităr Papazov, ĝenerala sekretario de BEA. Koncize oni traktis la sukcesojn kaj problemojn de la sciencistoj-esperantistoj en nia lando.

Estis fondita Scienca Esperanto-Societo kiel kolektiva membro de la Unuiĝo de sciencistoj en Bulgario. Oni pridiskutis ties statuton kaj elektis estraron: prof. V. Peevski (prezidanto), doc. C. Kardašev (vicprezidanto), doc. St. Stojčev (sekretario) kaj membroj k. t. sc. Kiril Velkov (Vraca) kaj doc. Bojan Lalov (Sliven). Oni emfazis la bezonon pri uzado de Esperanto kiel rimedo por kvalifiko kaj kreado de diversfakaj sciencistoj kaj por popularigo de la bulgaraj sciencoj kaj kulturo. Speciale oni turnos atenton al preparo de novaj junaj sciencaj kadroj kaj kunlaborado kun diversaj organizoj en- kaj eksterlande.

doc. Cvetan KARDAŠEV

EMOCIPLENA CELEBRO

La 5-an de julio j. k. en la halo de Patrolanda Fronto en Sofio okazis solena celebrazo dediĉita al la 80-jara jubileo de la multjara esperantista aganto Nikola Aleksiev. Raporton pri lia vivo kaj agado faris Ĥristo Gorov. Oni tralegis salutleterojn de prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) d-ro Imre Pethes kaj de Vjetnama Pacdefenda E-Asocio. En la nomo de Buroo de CE de BEA Sava Dălbokov, prezidanto de BEA, prezentis salutadreson kaj donacon al Nikola Aleksiev.

En la nomo de bulgara MEM-sekcio gratulojn esprimis ĝia prezidanto Dimităr Haĝiev. La jubileanto ricevis florojn kaj varmajn amikajn vortojn en la nomo de Redakcio de gazeto „Paco“, de Centra Esperanta Kulturdomo „Maksim Gorkij“ (Sofio), de E-Domoj en Plovdiv kaj Stara Zagora, de multaj E-societoj el Sofio kaj el la lando. Sian emocian eseon, verkitan speciale por la jubileo, tralegis Georgi Miĥalkov.

En sia respondo al la salutoj kaj bondeziroj Nikola Aleksiev dankis pro la kortuŝa etoso kaj interalie diris: „La faro de la veteranoj-esperantistoj devas esti daŭri-

gata de la junularo. Tio estas la ununura vojo al senĉesa evoluo kaj supreniĝo de nia E-asocio, de nia popolo. Uzu la sperton de la veteranoj, aplikendan kun via junula impeto. Faru ĉiam laboron por la bono de la E-movado!"

Komenciĝinta per la kant-gratulo de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj, la vespero finiĝis ankaŭ per kantoj; per malnovaj kanzonoj el la junaĝo de la jubileanto lin salutis kantistino Maria Kokareškova.

V. DIMITROVA

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO

Jurnalo „**Rabotničesko Delo**“ (9.06.1989) presigis informon de Valentin Bojaĝiev pri antaŭstarantaj turistaj esperantaj tagoj en Sofio; la sama ĵurnalo (8.07.1989) informas pri starigo de unuigo neprofitocela por komuna agado ĉe E-societo „Lumo“ en u. Veliko Târnovo; ĵ. „**Oteĉestven front**“ (16.06.1989) aperigis artikolon de Kunĉo Vâlev pri Bulgara Esperanto-Teatro (BET); la sama ĵurnalo (17.06.1989) donis lokon de artikolo de Slavĉo Davidov pri antaŭstarantaj Univerala Kongreso de Esperanto en Braĵtono kaj la kongreso de TEJO en Kerkraĉe; en la sama ĵurnalo (24.07.1989) denove Slavĉo Davidov informas pri la Sepa Sesio de Somera Esperanto-Universitato en u. Veliko Târnovo; ĵ. „**Trud**“ (29.06.1989) publikigis artikolon de Dimitrina Zareva pri la eminenta socia aganto kaj esperantista veterano Nikola Aleksiev, okaze de lia 80-jariĝo; ĵ. „**Veĉerni novini**“ (8.06.1989) aperigis informon de Nikola Nikolov pri antaŭstarantaj turistaj esperantaj tagoj en Sofio; la sama ĵurnalo (19.06.1989) lokigis artikolon pri BET okaze de ĝia 30-jara datreveno; ĵurnalo „**Aprilsko Delo**“ (11.05.1989) informas pri antaŭstarantaj internaciaj kaj enlandaj esperantaj aranĝoj; la semajna gazeto „**Narodna Kultura**“ (14.07.1989) donas lokon al artikolo de Venelin Mitrev, analizanta la arton de esperantaj amatoraj ensembloj en la lando; la semajna turista gazeto „**Eĥo**“ (8.06.1989) informas pri antaŭstarantaj turistaj esperantaj tagoj (9—11.06.1989) en Sofio; la semajna porlernanta gazeto „**Srednoškolsko Zname**“ (26.04.1989) donis lokon al granda informo de Kunĉo Vâlev pri naciskala Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto en u. Stara Zagora; la sama gazeto (31.05.1989) presigis artikolon „Ĉu estas malfacile ellerni Esperanton?“ de Kunĉo Vâlev; la sama gazeto (5.06.1989) publikigis impresojn de Anri Milenkov pri lernhoru en la esperantista klaso de la instruistino Ivanka Spasova en 8-a mezlernejo „Vasil Levski“ en Sofio. La tri materialojn la redakcio apartigadis kiel rubriko „**Esperanto**“.

EN LA LANDO

Jurnalo „**Narodno Delo**“ — u. Varna (28.03.1989) presigis informon de Virĝinia Kirilova pri ekspozicio de brodaĵoj, ellaboritaj de esperantistinoj el u. Varna; la sama ĵurnalo (23.04.1989) donis informon de la veterano Nikolaj Kulev pri la antaŭstaranta naciskala renkontiĝo de la esperantaj veteranoj en Varna; ĵ. „**Borba**“ — u. Veliko Târnovo (6.07.1989) detale informas pri starigo de unuigo neprofitocela ĉe loka E-societo „Lumo“ por komuna agado kun neesperantaj instancoj kaj entreprenoj, kiel

la komunumo, Komunuma Komitato de Patrolanda Fronta, loka ŝtata universitato „Kiril i Metodij“, 5 entreprenoj; la sama ĵurnalo (20.07.1989) presigis detalan informon de Veselin Ĥristov pri pasigo de 7-a sesio de Somera Esperanta Universitato en u. Veliko Târnovo (15—21.07.1989); ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ — u. Ŝumen (14.04.1989) aperigis informon de Cvjatko Todorov pri partopreno de esperantaj junuloj el u. Ŝumen en Nacia Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto en u. Stara Zagora; en la sama ĵurnalo (23.06.1989) Stela Minĉeva verkis skizon pri Todor Lazarov el Ŝumen, nun loĝanta en u. Varna, okaze de lia granda mondonaco al Supera Pedagogia Instituto en u. Ŝumen memore al sia kara filino, docento pri bulgara filologio en sama instituto. Oni menciis ankaŭ lian 66-jaran esperantan aktivadon; urba ĵurnalo „**Ustrem**“ — u. Kaspiĉan (19.05.1989) informis pri kunveno, proklamanta la kunigon de la esperantaj societoj en u. Kaspiĉan kaj v. Madara en komunuma societo de u. Kaspiĉan; la uzina ĵurnalo „**Duma na Metalurga**“ — Entrepreno por produktado de aluminio en u. Ŝumen (31.03.1989) presigis informon de Cvjatko Todorov pri partopreno de membroj de uzina esperanta klubo „Metalurgo“ en naciskala esperanta turista renkontiĝo en u. Jambol; la sama ĵurnalo (14.04.1989) presigis artikolon pri V. I. Lenin, tradukita el Esperanto fare de Cvjatko Todorov.

Krâstju KARUCIN

VERA NOVAĴO

Aŭguste la Redakcion atingis agrabla novaĵo. Venis provnumero en Esperanto de la famekonata sovetia ĵurnalo „Moskvaj Novaĵoj“. Esperanto havas ĉiujn ŝancojn aliĝi al la grupo de naŭ aliaj lingvoj, en kiuj aperas „MN“.

La formato de tiu provnumero estas malpli granda el la ordinara, la paĝoj estas 3.

La numero konsistas precipe el jam publikigitaj artikoloj, tradukitaj sperte, estas ankaŭ priesperantaj publikaĵoj.

La Redakcio de „MN“ atendas resonajn, de kies nombro dependas ĉu tiu provnumero restos unika aŭ komencos regula aperado de tiu ĵurnalo en Esperanto-versio.

Skribu al: USSR, Moskvo, Gorki str. 16/2, Moscow News

Ni salutas la redaktoron de la provnumero Vladimir Samodaj — prezidanton de Sovetrespublikara Esperantista Unio.

Bonan venon en la vicon de E-eldonaĵoj kaj sukcesan vojon!

La Redakcio de „BE“ kaptas la okazon gratuli ankaŭ alian novan Esperanto-eldonaĵon en Sovetunio — „Sovetia Esperantisto“, eldonata de bakua Esperanto-klubo „Ĥazar“ kaj Esperanto-kooperativo „Luĉ“. Tiu ĵurnalo aperas en tri lingvoj: Esperanto, rusa kaj azerbajĝana, kaj atingas siajn legantojn dufoje monate. Redaktas Ŝaig Bahram oglu. La adreso de la redakcio: a/k 3, Baku—146, 370146 SU; tel. 66-89-31.

„BE“

MEMORE AL SIMANANDA



En suna julia tago ĉesis bati la nobla koro de Simeon M. Simeonov. Li adiaŭis nin en sia 90-jaraĝo.

Modeste li vivis kaj diligente riĉigis la poezion de Esperanto ĝis la lasta spiro.

Lia preferata verkado estis la liriko, per kiu li esprimis siajn sentojn kaj travivaĵojn kiel civitano, pachtalanto kaj kavaliro de la verda stelo.

Estante vera poeto, liaj versoj sonis kiel muziko. Li apartenas al la generacio de Ĥristo Rjaĥovski kaj Petko Jordanov. Post ili eksonis lia liro samtempa kun Dimitro Zlatarski kaj Asen Grigorov.

En 1922 jam komencanta poeto li versis:
„Sennombraj animoj ploradas
kaj plendas,
feliĉon ŝercadas
la tuta homaro la savon atendas...”

En alia versaĵo li montras la malamikojn de la civilizacio:
„Preparas ili la pereon de l'ho-

maro
per armil' diversa, plej barbara...”

Simananda multe laboris sur kampo de tradukarto. Diference de muziko, pentro- kaj skulptarto, la literatura kreado estiĝas en la kadroj de nacia lingvo. Por fari ĝin komprenata de alilingvano, estas necesa kvalita traduko. Dank' al la tradukarto bulgaraj poetoj fariĝis konataj al la verda popolo. Tamen la traduko devas esti fidela al la originalo. Tion povas nur perfektaj tradukistoj. Nome tia estis Simeon M. Simeonov.

Liaj preferataj aŭtoroj estis la popola poeto Ivan Vazov, lirikisto Dimĉo Debeljanov, la granda poetino Elisaveta Bagrjana, la verkistino Leda Mileva k. a.

Kiuj poeziŝatantoj deziras ĝui liajn originalajn kaj tradukitajn verkojn, povus serĉi ilin en la antologio „Rozo kaj glavo” kaj en „Antologio de nuntempa poezio kaj prozo” — ambaŭ eldonitaj fare de BEA.

Dum longaj jaroj kiel aktiva membro de sofia societo „Maksim Gorkij” li partoprenis en la literaturaj vesperoj legante siajn sincerajn versaĵojn.

Li testamentis al ni sian kredon:

„Kun ni ja estas la justeco kaj la vero
kaj la plimulto de l'homar' de l' tuta Tero.
Triumfos baldaŭ nia nobla idealo —
sur la planedo venkos nia pachtalo!”

Hristo GOROV

AL LA STELOJ...

memore al SIMEON M. SIMEONOV

*Veturas for vi al la steloj...
al la senlima eterneco,
kie ekbrilas or-ĉielo
kaj regas pac' kaj trankvileco...
Ĉu estis vi anĝel' kvieta,
donata sur la tero saĝon?
Jes, via poezi' impeta
sugestis juston kaj kuraĝon!.*

21.07.1989

*Lasanta gravan heredaĵon
el versoj propraj kaj tradukojn
kaj rezistante malbonaĵojn
obstine semis vi edukon...
Do... prenis vin jam nubo hela,
alflugo muta... sen reveno!..
Por ni, per rememoro bela,
funebro restis kaj ĉagreno...*

Miŝo ZDRAVEV,
membro de la Sofia Literatura
Rondo
„Asen Grigorov”

Centjariĝo de Vela Piskova

Esperanto-movado en Ŝumen havis en siaj vicoj multe da revolucioj, famaj antifaŝistoj. Inter ili apartan lokon okupas Vela Piskova (28.11.1889—29.03.1925). Ĉi-jare kompletigis 100 jaroj de ŝia naskiĝo kaj 64 jaroj de la glora morto.

Vela Piskova naskiĝis en Veliko Târnovo. Jam 18-jara ŝi fariĝis membro de Bulgara Laborista Social-Demokrata Partio (BLSDP). Post sukcesa fino de Ŝumena Pedagogia Junulina Lernejo, ŝi dum kelkaj jaroj estis instruistino. En 1917 V. Piskova finstudis la Sofian Universitaton pri fako matematiko kaj fiziko.


Dum la militjaroj Vela laboris aktive en la virina movado en Ŝumen. Post la milito ŝi instruis en Ŝumena Pedagogia Lernejo, kaj en 1923 en Bjala Slatina. Dum la Septembra kontraŭfaŝisma ribelo tie ŝi gvidis la batalgrupojn en tiu malgranda urbo. Post la ribelo ŝi revenis en Ŝumen. Ĉi tie ŝi laboris por la revigligo de la partia organizaĵo en la urbo.

En 1924 jaro Vela estis elektita sekretario de la distrikta komitato de Bulgara Komunista Partio. Ŝi kontribuis por plifortigo de la partiaj organizaĵoj kaj postlasis gravan spuron en la historio de tiu organizaĵo. Komence de 1925 ŝi jam faris partian laboron en urbo Ruse kaj estis kunlaborantino de Milita Fakto de Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio. Murdita en kruela kaj sovaĝa batalo kontraŭ pli ol 200 policanoj kaj caraj soldatoj.

Dum sia aktiva agado ŝi neniam forgesis pri Esperanto. Kiel instruistino ŝi gvidis E-kurson por la junulinoj en la Ŝumena Pedagogia Lernejo.

La ŝumenaj esperantistoj estimas la nomon de Vela Piskova kaj ĉiam en festoj kaj datrevenoj metas la florkronojn antaŭ ŝia monumento, troviĝanta en Urba ĝardeno de Ŝumen.

Hristo TONEV



Deziras korespondi

BULGARIO

ELENA VÂLEVA (15-jara) — 8600 Jambol, j. k. „Lenin” bl. 2, ap. 29 — kun ĉi pri flaŭro, faŭno, kolektas pm kaj kalendaretojn.

EMILIJA DIMITROVA (30-jara instruistino) — 1229 Sofio, j. k. „Nadejda” IV, ul. „Bjal ljujak” 8A — kun ĉi pri ĉt.

IVANKA STOJANOVA (39-jara) — 9000 Varna, ul. „Batak” 4, ap. 18 — kun ĉi pri ĉt.

JORDAN JORDANOV (35-jara investanto) — 5100 G. Orjaŭovica, ul. „Alen Mak” 3 — kun ĉi pri ĉt.

JANKA DASKALOVA (49-jara inĝenierino) — 8600 Jambol, ul. „Stara Planina” 12, vñ. II, ap. 37 — kun ĉi pri turismo, kino.

SIJKA DIMITROVA (37-jara inĝenierino) — 8600 Jambol, ul. „Trakija” 26 — kun ĉi pri kino, literaturo, turismo.

IRANO

ABBAS NOEI (32-jara instruisto pri literaturo) — Talghani Str. 26, 43391 Khoshkbijar, Gilan — kun eŭropaj esperantistoj pri literaturo, arto, historio k. a.

M. MEHDI NORUZI (18-jara gimnaziano) — 9 Shahid Mokhtari Alley, Chods, Shahreid St., Bozorgmehr Ave., Esfahan 81579 — kun ĉi pri ĉt.

AKRAM RAZGORDANI (17-jara lernantino) — Arak Iran, P. O. Box 38135-139 — kun bulgaraj esperantistoj pri ĉt.

POLLANDO

JERZY WÓJCIK (24-jara studento) — PL-41-902 Bytom, ul. K. Miarki 28/7 — kun ĉi pri turismo, literaturo, muziko, kolektas bk, librojn.

BOZENA KOWALCZYK (28-jara) — PL-44-109 Gliwice 9, ul. Z. Nalkowskiej 3/10 — kun ĉi pri vojaĝado, drogherbkuracarto.

CEPCER JANUSZ (25-jara studento) — PL-34-120 Andrychów, ul. Metalowców 1/39 — kun ĉi pri turismo kaj sporto.

LEON CHODERA (47-jara inĝeniero) — PL-03-214 Warszawa, ul. Krasnobrodzka 17 m. 190 — kun bul-

garaj esperantistoj pri ĉt, kolektas pm, bk, E-librojn. LUCYNA CHODERA (30-jara) — PL-77-400 Złotów, obr. Warszawy 3 2 — kun ĉi pri vojaĝado, kolektas bk kaj pm.

MARIAN WOLNY (24-jara) — PL-44-109 Gliwice, Wolności 1/47 — pri karateo kaj aliaj orientaj luktartoj, pentroarto.

KRYSTYNA WŁODARCZIK (33-jara ekonomikistino) — PL-31-627 Kraków, ul. Skarżyńskiego 2/404/II — kun ĉi pri teatro, sporto, vojaĝado.

LESZEK SIKORA (35-jara matematikisto) — PL-41-800 Zabrze, ul. Nad Kanalem 24/16 — kun ĉi pri montara turismo kaj fotoarto.

SOVETUNIO

REGINA ŠVARCOVA (35-jara farmaciistino) — SU-235720 Palanga-2, Kuršiu takas 1, Litovio — kun ĉi pri ĉt.

JOLANTA PLEIKITE (17-jara lernantino) — SU-235700 Kretinga, Šventosios 15, Litovio — kun ĉi pri ĉt.

DAINIUS PRANAUSKAS (23-jara studento) — SU-232042 Vilnius, ul. Putnos 9-78, Litovio — kun ĉi pri muziko, medicino, fotado, interŝanĝas librojn, pk, esperantaĵojn.

ANTANA KRENCEVIČIUS (38-jara matematikisto) — SU-232010 Vilnius, a/d 1634, Litovio — kun ĉi pri ĉt.

LUDMILA SJEREBRJENNIKOVA (30-jara korektistino) — SU-610027 Kirov, ul. Karl Marks, d. 167, kv. 37 — kun ĉi pri kino, literaturo, klasika muziko, kudrado, trikado, brodado.

ENE REBANE (20-jara poŝtoficistino) — SU-203170 Estonio, Haapsalu, Mulla 6-60 — kun ĉi pri ĉt.

REIN SAAR (34-jara inĝeniero) — SU-203170, Estonio, Haapsalu, Niine 22 — kun ĉi pri ĉt.

SERGEJ PAŤOMOV (26-jara) — SU 613020 Kirov-obl., Langasovo, ul. Lenina 2-10 — kun samaĝaj esperantistoj el la tuta mondo pri E-movado, turismo, lingvoj, sporto, muziko, kino, literaturo.

FILATELO

Okaze de la „200 jaroj de la Granda Franca Revolucio” Asocio „Komunikado” en PR Bulgario emisiis en junio 1989 specialan serion de tri poŝtmarkoj.

Sur la poŝtmarkoj pantristo Kânčo Kânnev desegnis jenajn objektojn: tri

stiligitaj kolomboj kaj portretoj de la gvidantoj de la revolucio Marat kaj Robespier.

Valoroj: 13,20 kaj 42 stotinkoj.

Formato: 44 × 29 mm (horizontale) ĉiu.

Dentumo: 13.

Papero: 100% gumita celulozo.

Tekniko: ofseta presado.

Presejo: Ŝtata Presejo de la Komunikado-Sofio.

Eldonkvanto: 250 000 kompletaj serioj.

Drăguško PETROV





LA PREMIO

Solvintoj de la enigmo „Arkoj“, publikigita en n-ro 6/1989 de „BE“ estas: Violeta Štereva, Ĥaskovo; Vasilka Malinova, D. Lozen; Minko Minkov, Sevlievo; Atanas Gaev, Asenovgrad; Cveta Popova, Pernik; Ivanka Ivanova, Miĥajlovgrad; Dimităr Canev, Popovo; d-rino Lozana Georgieva, Berkovica; Enju Enev, Burgas; Jordanka Bojkova, Burgas; inĝ. Ivan Slávik, Nova Dubnica (ĈSSR); Sergej Korda, Tiraspol (USSR); Vladimir Kornilov, Doneck (USSR); d-ro Ot- to Kaczinski, Havelberg (GDR); Antero Harju, Kuusankoski (Finnlando); František Molik, Náchod (ĈSSR); Vladimir Juromski, Vilnius (USSR).

Ni dankas pro iliaj respondoj.

Post lotumado libro-premion gajnas ĉi-foje Vasil Georgiev el Ŝumen — „Amo mia“ de Ĥristo Radevski. Elkoran gratulon!

Fine jen la solvo de „Arkoj“ el „BE“, n-ro 6/89:

Dekstren: 1. Beleva (Belka). 2. Dinamo. 3. Dazipo. 4. Kamelo. 5. Rafano. 6. Kataro. 7. Ŝakalo.

Maldekstren: 2. Derivo. 3. Dilemo. 4. Kanapo. 5. Razilo. 6. Kameno. 7. Ŝafaro. 8. Batalo.

ANAGRAM-ENIGMO

Miksu la literojn de „dikhaŭta hufula tropika besto“ tiel, ke vi tralegi „marrabisto“.

Cvetan MANOJLOV


Noto de la Redakcio: La solvojn de la „Diagonaloj“ kaj „Anagramenigmo“ ni atendas ĝis la 15-a de decembro 1989. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 2/1990 de „Bulgara Esperantisto“.

DIAGONALOJ

Dekstren: 1. Kongresurbo de tri Universalaj Kongresoj de Esperanto. 2. Malantaŭo de korpo. 3. Simpatia aŭstralia besto. 4. Grupo da lernantoj, kiuj lernas kune. 5. Muzikkestro kun turnilo. 6. Koloro de la espero. 7. Prepozicio. 9. Prefikso.

Maldekstren: 2. Prepozicio. 3. Portebla ujo farita de sekigitaj vegetaĵoj k. s. 4. Malmola elstaraĵo sur la kapo de iuj bestoj. 5. Trinkujo. 6. Reteca travidebla teksaĵo, kiun oni fiksas al virina ĉapelo antaŭ la vizaĝo. 7. Ano de iama lando en Proksima Oriento. 8. Ĉeakva tero. 10. Konjunkcio.

Cvetan MANOJLOV



*Bonan
apetiton!*

KOKIDO EN PASTO

Produktoj: unu kokido (1 kg), 1-2 cepbulboj, 200 g da freŝa butero, 1/2 de tetaso da rizo, tekulero da nigra pipro, 3 ovoj, 1/2 de fasko da petroselo, 500 g da faruno kaj salo laŭ gusto.

La purigitan kaj lavitan kokidon oni farĉas per miksaĵo el la dispecigitaj kokidaj internaĵoj, 4 supkuleroj da butero, erigitaj cepo kaj petroselo, la rizo, la pistita nigra pipro, unu el la ovoj — malmole kuirita, salo kaj tri kvaronoj de tetaso da akvo.


El la faruno, unu ovo, salo kaj akvo oni knedas paston kaj faras el ĝi pastfolion, kiu estas dika 0,5 cm, ŝmiras ĝin per 2 supkuleroj da butero, faldis ĝin kelkfoje kaj denove ĝin foliigas kaj ŝmiras per unu tekulero da butero. Nun oni volvas la farĉitan kokidon en tiun pastfolion, ŝmiras per la restinta butero miksaĵo kun la tria kirlita ovo kaj bakas ĝin en mezforte varmigita forno ĉirkaŭ horon kaj duonon.

Al la manĝotablo oni prezentas ĝin distranĉitan je pecoj kun la salato.

Petko ARNAUDOV

Kiel anoncite, ni publikigas la unuan parton el la libro „Vanga” de Krasimira Stojanova. La libron aŭtune aperigos eldonejo „Balgarski pisatel” („Bulgara Verkisto”); jam estas preparataj ankaŭ kelkaj fremdlingvaj eldonoj. Ni esperas, ke tiu publikaĵo estos interesa kaj por bulgaroj, kaj por eksterlandanoj. Iuj eksterlandanoj eble unuafoje eks- cios pri tiu eksterordinara virino. La bulgaroj jam sendube ko- nas la nomon de Vanga: nun ili informiĝas pri ŝi iom pli detale. Ĉar post la ĉi-numeraj biografiaj notoj kaj enkonduko (sur p. 24—25) sekvas konkretaj ekzemploj el ŝia praktiko (sur La verko pretendas esti dokumenta. Pri la enhavo responde- cas la aŭtorino. La Redakcio atendas viajn reagojn. Ni volonte konigos viajn opiniojn al Krasimira Stojanova.

„BE”



BIOGRAFIAJ NOTOJ

Oni nomas ŝin „fenomeno № 1 en la mondo”, „viva ora- kolo”, „Kassandra de la dudeka jarcento”, „profetino plej grandskala” ktp. Proksimume kvindek jarojn manifestiĝas ŝia eksterordinara talento de aŭ- guristino kaj sentitola kuracis- tino, kaj ŝia famo jam delonge trapasis la limojn de Bulgario. La bulgaroj respektas ŝin kva- zaŭ sanktulino, kiu donacas al la homoj esperon kaj resani- ĝon. Ŝian nomon konas multaj eminentuloj el la tuta mondo kaj el ĉiuj sferoj de la vivo.

Nuntempe la sciencistoj an- koraŭ ne povas klarigi la natur- doton de Vanga Dimitrova. Es- tas malfacile klarigebla la faci- leco, per kiu ŝia penso translo- kiĝas en la tempo kaj en la spa- co, malfacile komprenebla es- tas la mekanismo, per kiu ŝi perceptas informojn el la

malproksima pasinteco aŭ el la fora estonteco — informojn ne nur pri apartaj personoj, sed ankaŭ pri tutaj urboj, popoloj kaj ŝtatoj. Ne eblas skizi la ko- losan amplekson de ŝiaj ka- pabloj, kiuj inkludas kaj la kon- taktojn de Vanga kun mortintoj kaj kun la muta naturo; kaj la nekredeblajn diagnostajn kaj kuracistajn scipovojn; kaj la strangajn, sed efektivajn meto- dojn de sanigado — precipe per drogherboj kaj aliaj naturaj ku- racrimedoj; kaj ŝiajn kontak- tojn kun la Kosmo kaj kun eks- terteraj estaĵoj; kaj ŝiajn prognozojn pri la estonteco de la Tero kaj de la Universo.

En la biografio de Vanga es- tas nenio eksterordinara. Ŝi naskiĝis la 31-an de januaro 1911 en urbo Strumica (nun en Jugoslavio) kaj loĝas de 1942 en urbo Petriĉ. Interalie, ŝiaj fratoj Tome kaj Vasil estis membroj de E-klubo en Strumi-

ca dum la periodo 1939—1943. Ankaŭ la plej juna fratio — Ljubka — konatiĝis kun la Inter- nacia Lingvo. Laŭ komiso de la fratoj ŝi disportis tiam malper- mesitajn marksismajn kaj E- librojn. Ankaŭ nun ŝi memoras kelkajn frazojn en Esperanto.

Kiam Vanga estis 13-jaraĝa, ŝiaj okuloj inflamiĝis kaŭze de forta ŝtormo, kiu trafis ŝin sur- kampe. Pro malriĉeco ŝi ne ri- cevis kvalifikitan medicinan helpon kaj baldaŭ blindiĝis. Kvin jarojn poste la sorto dona- cis al ŝi „alian, neteran kaj ne- homan vidkapablon”, per kiu ŝi ekvidis bildojn el la nekonata por ni mondo; ŝi ekposedis la kapablon enpenetri niajn ani- mojn kaj „legi” niajn pensojn.

Plej forte la talento de Vanga manifestiĝis en la antaŭvespe- ro de la Dua Mondmilito, kiam la homaj suferoj, teruro kaj ĉagreno atingis grandegajn di- mensiojn, sed ŝi per siaj aŭgu- roj kontraŭstaris al la fajro de la milito kaj inspiris al la homoj esperon kaj firman kredon, ke la vivo sur la Tero ne pereos.

Ekde tiam ĝis nun, konscian- te sian malfacilan kaj respon- decan mision, ŝi kiel pastrino antaŭ la altaro de la Vivo instruas ilin esti bonaj, ami sin reciproke, senti la dolorojn kaj la suferojn de aliuloj kaj postla- si al siaj idoj heredaĵon el inspi- ra laboro, digno kaj beleco — en la nomo de tiu nura kaj uni- ka Vivo.

LEGU PRI VANGA SUR p. 24— 25!